REGO

☆ RUSIA ESPERANTO-GAZETO ☆

komuna eldono de REU kaj REJM *№ 2 (21) aprilo 2004*



en la numero

Atingoj de la Jaro 2003 en Rusia E-Movado
rakonto pri REK-23 kaj EoLA-16
novaĵoj pri "Esperantista Printempo en Uralo" kaj RET-04
Laborplano kaj Buĝeto de REU por 2004 en "Bulteno de REU"
novaj versaĵoj de Klara Ilutoviĉ
novaĵoj, anekdotoj kaj multo alia

Moskvo, 2004

Atingoj de la Jaro en Rusia Esperanto-movado

Rusia Esperantisto-2003

Viktor Kudrjavcev



Esperantaĵo-2003

"Komencanto"

Kantisto-2003 kaj Poeto-2003

Mikaelo Bronŝtejn

E-Aranĝo-2003

RET-03 apud Kovrov

LA 23-A REK KAJ LA 16-A EOLA



Pasis ankoraŭ unu Kongreso kun la vica REU-Konferenco kaj ankoraŭ unu festivalo EoLA. Ĉi-foje, same kiel antaŭ 3 jaroj, la du aranĝoj pasis sinsekve en la sama loko. Plusoj en tiu kunigo estas laŭ mia opinio pli multaj ol minusoj. En REK-EoLA partoprenis 73 personoj: Volgograd kaj Volgograda regiono – 30, Moskvo kaj Moskva regiono – 10, Ĉeboksari kaj Novoĉeboksarsk – 6, Novosibirsk – 4, po 2 el Jekaterinburg, Jelec, Novoĉerkassk, Sankt-Peterburg, po 1 el Arĥangeljsk, Dimitrovgrad, Iĵevsk, Maĥaĉkala, Permj, Rostov-na-Donu, Samara, Tiĥvin, Uljanovsk, Volgodonsk; estis ankaŭ 1 persono el Taĝikio, 2 – el Germanio (ĉiuj tri nuntempe loĝas en Moskvo), 1 – el Usono, 1 – el Francio. La germaninoj Kirstin Engels kaj Britta Loose kaj la usonano Chuck Smith ege kontribuis al programo kaj etoso de la aranĝo dum la tuta semajno.

Plena listo de la partoprenintoj de REK-EoLA kaj pli ol 700 fotoj pri la aranĝo troveblas en la ttt-ejo <http://www.stelaro.by.ru/rek-eola/esp/index.html>.

Komence, la 21-24-an de februaro, okazis la 23-a Rusia Esperantista Kongreso. Kiel kutime ĉefa parto de ĝia programo estis REU-Konferenco, ĉi-foje la 20-a. Pri ĝiaj rezultoj vi povas legi en la "Bulteno de REU" ĉi-numere. Necesas nur aldoni ke nun Konferenco pasis pli trankvile, ol dum kelkaj antaŭaj jaroj, la diskutoj estis pli pacaj kaj malpli longaj, por elekto de la prezidanto sufiĉis unuŝtupa voĉdono. Nur la diskuto pri ĉuelekto de la vicprezidanto(j) okazis iom arde kaj emocie. Alia grava kaj interesa parto de la Kongreso estis voĉdonado pri Atingoj de la Jaro 2003 en la rusia E-movado; ĝiajn rezultojn vi povas ekscii el la dua kovrilpaĝo.

La 24-an de februaro komenciĝis la festivalo EoLA. Unuavice necesas mencii grandan laboron de la volgogradanoj pri preparo de diversaj ornamaĵoj por la ejoj kaj akcesoraĵoj por programeroj de la festivalo. Al ĉiuj partoprenintoj ege plaĉis la ludo "Majstroj", dum kiu konkursantoj el la publiko devis en diversaj konkursoj provi per lerteco kaj inteligenteco venki kontraŭ speciale preparitaj

partoprenantoj de la konkurso pri kostumoj

"majstroj". Inter la artaj konkursoj, kiuj tradicie estas ĉefa enhavo de EoLA, ĉi-foje, same kiel dum la du antaŭaj, aparte elstaris la teatra konkurso. Volgogradanoj, novosibirskanoj kaj ĉeboksaranoj montris po kelkaj anticipe preparitaj teatraĵetoj. Grandan parton de la taga programo okupis diversaj prelegoj kaj metiejoj (ĉilastaj bedaŭrinde okazis plej ofte en la rusa lingvo). Post la vespera programo ĉiutage funkciis diskoteko kaj gufujo. Gufujo, transprenita de internaciaj E-aranĝoj, fariĝas ankaŭ ĉe niaj renkontiĝoj tradicia parto de la programo kaj etoso. Estas vere bone, ke homoj, kiuj ankoraŭ ne volas dormi, povas sidi en speciala ejo, babili, partopreni surtablajn ludojn, aŭskulti trankvilan muzikon, ion trinki kaj manĝi.

Brila kulmino de la tuta semajno estis la koncerto de JoMo. Li estis invitita al Volgograd dank' al subvencio de la urba komitato pri junularaj aferoj por partopreni en la Lingva Festivalo, okazigita de la volgogradaj esperantistoj la 29-an de februaro, sekvatage post la fino de REK-EoLA. Sed li speciale venis je du tagoj pli frue por koncerti en la lasta tago de EoLA. Li alflugis Moskvon la 26-an de februaro kaj samtage enbusiĝis por veturi al Volgograd. La buso paneis dum la vojo, JoMo perdis 4 horojn antaŭ ol troviĝis loko en alia samitinera buso. Rezulte li venis al Volgograd ne matene, kiel estis planite, sed posttagmeze, kaj atingis EoLA-ejon ĉ. la 15-a horo, post preskaŭ dudiurna vojaĝado. Malgraŭ ĉio jam samvespere li koncertis kaj, kiel kutime, ŝarĝis ĉiujn aŭskultantojn (fakte dancantojn, ĉar preskaŭ neniu sukcesas trankvile sidi dum lia koncerto) per sia energio kaj senlaceco.

nur kadavroj kapablus resti senmovaj dum koncerto de JoMo

Ankoraŭ ne estas decidite pri la loko(j) de REK kaj EoLA en 2005. Mi opinias, ke ni devas plu klopodi okazigi ilin sinsekve kaj samloke. Unue tio donas eblon al dezirantoj partopreni du gravajn aranĝojn per unufoja vojaĝo, due tiel ni ŝparas organizajn fortojn, kiuj nuntempe ne estas tro abundaj en nia lando. Por ke la sekvajara REK-EoLA estu pli sukcesa, ol la ĵusa, REU-Estraro kaj REJM-komitato devas jam dum proksima tempo elekti urbon por la aranĝo. Laŭ mia opinio plej gravas, ke troviĝu spertaj aktivuloj, kiuj havus deziron bone prepari kaj sufiĉan forton por altnivele okazigi la kongreson kaj festivalon en 2005.

Garik Kokolija (Moskvo)

senlaca JoMo

La 28-an de februaro (la lasta tago de EoLA) estis solene disdonitaj premioj (kun libroj kaj kompaktdiskoj):

La unuan premion ricevis la klubo "Edmond Privat" (Ĉeboksari) por teatraĵetoj laŭ moralaj fabeloj de la homaro.

La duan premion ricevis la teatra grupo el Novosibirsk sub la gvido de Katerina Arbekova por la teatraĵoj "Cindrulino" kaj "Verda ĉapeleto".

La trian premion ricevis Volgograda Esperantista Junulara Centro "Stelaro" por la teatraĵetoj "Atlantido" kaj "Sistemo de Mendelejev".

Aparte estis premiita la teatra grupo el Volgograd sub la gvido de Tatjana Vtorova por teatraĵo laŭ rakontoj de O.Henry.

Por la plej bona traduko kaj prezento de kantoj en Esperanto estis premiita Tatjana Volodina (Volgograd).

La 6-an de marto dum vica kunveno prezidanto de VEJC "Stelaro" Eduard Kolosov kaj vicprezidanto de VEJC "Stelaro" Lana Kolosova solene esprimis dankojn kaj enmanigis donacojn por la plej aktiva laboro por okazigo de REK kaj EoLA al kelkaj membroj de "Stelaro":

Al Anatolij Krasnokutskij por prizorgo de jenaj agokampoj: Ĉiutaga funkciado de "Gufujo"; Efektivigo de aliro al Interreto; Konstanta fotado.

Al Aleksandr Koĉetkov por prizorgo de jenaj agokampoj: Sonreĝisorado; Komputilaj aferoj; Efektivigo de bonordeco de la koncerta halo.

Al Tatjana Volodina por prizorgo de jenaj agokampoj: Realigo de la kanta programo; Organizado de la fina balo; Gvidado de kelkaj metiejoj kaj kursoj.

Al Viktorija Dronova por prizorgo de jenaj agokampoj: Dekoraciado de la scenejo; Preparado de la ludo "Majstroj".

Al Vjaĉeslav Vnukov por: Plej gravaj roloj en ĉiuj teatraĵetoj de "Stelaro".

Al Olga Ĉugunkina por: Konstanta plenumo de multaj bezonataj aferoj.

la organizantoj sur la scenejo

“ESPERANTISTA PRINTEMPO EN URALO”

Karaj amikoj! Inspiritaj de la sukceso de la okazigita pasintprintempe regiona E-renkontiĝo “Primavero en Tobolsk”, kiu interalie laŭ voĉdonado dum REK en Volgograd okupis la 2-an lokon (cedinte nur al RET-03), teamo de entuziasmuloj decidis organizi denove printempan Esperantan renkontiĝon meze de nia grandega lando, apud la limo de Eŭropo kaj Azio, en la urbo Jekaterinburg. La renkontiĝo celos unuigi en la etoso de pura amikeco kaj ĝojo ĉiujn esperantistojn, kiuj deziras kune ripozi, amuziĝi, plibonigi la lingvoscion, priparoli diskutindajn temojn. Organiza teamo, kiu konsistas el jekaterinburgaj aktivuloj kaj elstaraj esperantistoj A.Kalaŝnikov, V.Opletajev, D.Gadirova, sincere strebos ke la estonta renkontiĝo restu en la koro kaj en la menso de ĉiu partoprenonto kiel bona memoraĵo! Pri sia partopreno jam anoncis Mikaelo Bronŝtejn, Anatolij Radajev, Garik Kokolija, Vera Zlotnikova, Gafur Gazizov, Tatjana Vŝivceva, Sergej kaj Zoja Fedotov-oj, Veniamin Rozenberg, Aleksandr Kalaŝnikov, Firdaus Kasimov kaj multaj aliaj interesaj kaj talentaj personoj.

Tempo: “Esperantista Printempo en Uralo” pasos la 1-3-an de majo 2004.

Loko: Jekaterinburg, la ripozejo “Bodrostj”. La ripozejo situas nur je 30 minutoj for de la fervoja stacidomo per metroo kaj trolebuso, ene de la urbo, kaj dum la renkontiĝo apartenos nur al esperantistoj.

Kiel atingi: De la fervoja stacidomo iri en ties metrostacion “Uralskaja” kaj veturi unu distancon ĝis la metrostacio “Maŝinostroitelej”. Poste eliri supren kaj iri al la samloka fina stacio de trolebuso numero 16. Per ĝi veturi ĉirkaŭ 10 minutojn ĝis la haltejo “Sportivnaja” kaj de tie iri rekte dekstren (laŭ direkto de la buso) al la ripozejo “Bodrostj” (en la rusa: sanatorij-profilaktorij “Bodrostj”) proksimume 5 minutojn. De la Suda aŭtostacio veturi per ajna tramo ĝis la haltejo “Cirk” kaj tie eniri metroon kaj veturi ĝis la sama stacio “Maŝinostroitelej” (plu vidu supre). Kiu venos al la fervoja stacidomo la 1-an sufiĉe frue matene (ĝis 11.00), bv trovi ejon de la turisma firmao “Divnij mir” (ĝi situas ĉe la maldekstra flanko de la Stacidomo, se eliri el la stacidomo al la stacidoma placo). Tie vin renkontos niaj esperantistoj Natalija Talankina kaj Nikolaj Petroviĉ Popov. De ĉi tie eblos organizi rektan “itineran taksion” al la ripozejo por grupo el 10-15 personoj.

Loĝkondiĉoj: Je nia dispono estas trilitaj ĉambroj en la sama etaĝo. Por du trilitaj ĉambroj funkcias aparta duŝejo kaj necesejo. Krome je nia dispono ni havos oportunan manĝejon, grandan salonon por la aranĝoj, dezirantoj povos mendi saŭnon. Ni (laŭ kontrakto kun la administracio) enloĝiĝas ekde la 13-a horo, sed veni kaj registriĝi eblos pli frue en la vestiblo.

Temo de la renkontiĝo: “Esperanto-movado bezonas kaj idealistojn, kaj realistojn – ni laboru kune!”.

En la programo:

– Diskuto pri la ĉefa temo – ne oficioza, sed male: tre vigla.
– Amika vespero – distra programero, en kiu partoprenos ĉiuj.
– La 25-jara Jubileo de SvEK – Sverdlovska Esperanto-Klubo.
– Gutoj de lingvoscio – interese kaj klerige pri nia lingvo (preparas kaj profesie

gvidos V.Opletajev, V.Zlotnikova).

– Vid-al-vide kun VIP – Vere Interesa Persono (pri si rakontos tiaj neordinaraj personoj kiel M.Bronŝtejn, A.Radajev, S.Fedotov, V.Zlotnikova kaj aliaj).

– Koncertoj de kanzonistoj kaj poetoj.

Hercogino instrukcias novan serviston. Ŝi klarigas ĉion plej detale kaj fine aldonas severe:
– Kaj ne forgesu: la matenmanĝo estas surtabligata precize je la oka matene.
– Mi komprenis, via moŝto. Tamen, se mi malfruos, komencu sen mi.

– Humura horo – partoprenas ĉiuj.

– Bluf-Klubo – nova por ni distra programero, kiun preparas R.Kudrjavceva.

– Junulara programo, amika babilado, komuna kantado, ludoj...

– Ekspozicio de artaj fotoj de Sergej Fedotov pri beleco de norda naturo.

– Dancoj ĝis mateno, kafumado, bierumado...

– Aliaj programeroj, preparataj de la gastoj.

Ekskursoj: Estas planataj ekskurso tra la urbo kun E-ĉiĉerono (inkluzivas viziton de originalaj lokaj muzeoj); ekskurso laŭ lokoj, ligitaj kun la familio de la lasta rusia caro Nikolao la 2-a: ĵus konstruita majesta katedralo ĉe la loko de ties mortigo kaj la funkcianta vira monaĥejo, fondita je memoro de la mortigitoj; la lasta loko, havanta historian nomon "Ganina Jama", situas eksterurbe en bela pina arbaro kaj estas atingota buse.

Kostoj: Loĝado kaj trifoja manĝado kostos 285 rublojn por 1 diurno. Do, por 2 plenaj diurnoj kun trifoja manĝado (+ unu aldona tagmanĝo la 3-an de majo) oni devas pagi 600 rublojn.

Aliĝkotizo: 100 rubloj. Ekskursoj pagendas aparte, dezirindas anticipe averti pri la partopreno, tiel ke ni mendu taŭgan buson. Ekskurso al la Katedralo sur Sango, poste al "Ganina Jama" daŭros kvar horojn kaj kostos 150 rublojn.

Ĉion eblos pagi surloke, sed ni petas vin averti anticipe pri via veno, por ke ni sciu, por kiom da personoj mendi tagmanĝon kaj ĉion ceteran.

Kontaktoj: Kudrjavcev Viktor, h.t. (343) 3814250, poŝtelefono (902) 5414656, <komencanto@r66.ru>; Kudrjavceva Raja, h.t. (343) 3814250, <komencanto@r66.ru>; Terjoĥin Vladimir, h.t. (343) 2238940; Talankina Natalija, of.t. (343) 3726275. Informojn pri "Esperantista Printempo en Uralo" vi povas legi ĉe <http://komencanto.narod.ru>.

PENSUME ANTAŬ LA NOVA RENKONTIĜO...

Aktiveco de uralaj esperantistoj nun estas en la fazo de vigla preparado de la regiona renkontiĝo "Esperantista Printempo en Uralo". Iu povas demandi, ĉu efektive gravas tiuj regionaj renkontiĝoj? Eble estus pli bone anstataŭigi ilin per tute aliaj poresperantaj aferoj kaj aranĝoj? Pasis preskaŭ unu jaro post la renkontiĝo "Primavero en Tobolsk", sed ĉe mi nur firmiĝis la sento, ke la regionajn renkontiĝojn utilas okazigi. Ili ja havigas al ni pliajn okazojn kunamikiĝi kaj spertiĝi, ĉar ofte partopreno en ili povas influi nin kiel instigilo por pli insista uzado de Esperanto. Dum ili ni povas transdoni al juna generacio bonan ekzemplon de poresperantaj entuziasmo kaj agemo. Tiuj renkontiĝoj certe fortigas la fadenojn, kiuj nin ligas.

Estante relative nova aktivulino en la rondo de uralaj esperantistoj, ĝuste dank' al "Primavero en Tobolsk" mi havis eblon pli bone ekkoni, amikiĝi kaj kunagadi kun vere neordinaraj personoj, kies partopreno sendube sukcesigis la renkontiĝon. Tiuj estas Dilara Gadirova, Aleksandr Kalaŝnikov, Vladimir Opletajev. Multo unuigas tiun triopon: ĉiuj ili estas laŭ profesio instruistoj, kompetentaj fakuloj pri la instruado de fremdaj lingvoj; estas fakto ke ĉiuj ili estas tre kleraj homoj, havas grandegan sperton pri la movado. Antaŭ 30 jaroj ili kunfondis en Tjumeno lokan klubon, gvidis kursojn, vigle movadumis kaj estis tri el plej sindediĉaj agemuloj. Ilin unuigas ankaŭ tio, ke antaŭnelonge ĉiuj tri festis siajn kvindekjarajn jubileojn. Sed ilia entuziasmo kaj agemo dum la renkontiĝo en Tobolsk montris al mi, ke ili restas same junanimaj, aktivaj kaj simpatiaj homoj!

Krom la granda organiza laboro surloke, kiun plenumis Dilara Gadirova, ŝi celis ankaŭ stimuli la noblajn kvalitojn de la junularo, partopreninta en "Primavero en Tobolsk". Iu diris, ke estas diverstemperaturaj esperantistoj: la malvarmaj, varmaj kaj varmegaj. Se dividi tiel, Dilara ĝuste apartenas al kategorio de la ege varmaj. Estis tre emocie, kiam ŝi salutis la ĉeestantaron en Tobolsk.

Mi multon antaŭe aŭdis pri Aleksandro Kalaŝnikov, pri lia neordinara kapablo trovi la vojon al koroj de gejunuloj – en Tobolsk mi povis mem konvinkiĝi pri tio kaj ankaŭ vidi kiel energie li povas engaĝiĝi en diversajn E-aranĝojn. Kun intereso mi aŭskultis rememorojn pri lia esperantista vivo – ili ĉiuj estas rakontindaj!

Min tre ravis la multfaceta personeco de Vladimir Opletajev. Li estas talenta instruisto, kaj mi konsilus al ĉiuj, ke oni nepre partoprenu liajn E-lecionojn, kiuj ne nur estas bonegaj kaj utilaj por novuloj, sed kaptas kaj tenas la atenton ankaŭ de esperantistoj kun sufiĉe longa sperto pri studado. Krom tio Vladimir estas tre iniciatema esperantisto, ĉiam plena de freŝaj ideoj. Kaj ankoraŭ lia altnivela posedo de nia lingvo puŝas almenaŭ min al plibonigo de la mia. Min kortuŝis simpla, sed tre sincera konfeso, kiun Vladimir ricevis dum la fermo de la renkontiĝo de juna komencantino el Tjumenj: "Vi estas bona homo, Vladimir Opletajev!" Mi povas aldoni, ke la tuta glora triopo meritas la plej bonajn, elkorajn vortojn kaj la movado bezonas tiajn homojn!

Estas agrable konstati, ke iliaj streboj kaj komuna kunagado ne restis senrezultaj, ĉar unu el gravaj atingoj de la okazigita renkontiĝo estas pli aktiva engaĝiĝo en la movadon de gejunuloj, kiuj partoprenis "Primaveron en Tobolsk". Komencis kreski kaj produktis siajn unuajn fruktojn iniciatemo de la juna tjumena generacio: la gejunuloj mem organizis kaj sukcese okazigis jubilean festan renkontiĝon, dediĉitan al la 30-jariĝo de Tjumena E-klubo. Estis spertuloj, kiuj dekomence dubis pri la junulara organiza kapablo, sed tio montriĝis neprava. Ĉiuj malnovaj tjumenaj esperantistoj, same kiel gastoj el aliaj urboj, feliĉe konstatis kreskantan junularan aktivecon. Al gejunuloj el Tjumeno mi mem povas nur diri: "Bravuloj! Daŭrigu!".

La renoviĝanta Esperanto-movado en nia regiono havas multon por lerni, sed ankoraŭ iom por lernigi. Mi opinias, ke multe pli grave ol paroli pri detaloj de okazintaj renkontiĝoj estas paroli pri homoj, iliaj faroj kaj atingoj, kiuj ligas ĉi tiujn eventojn tra la historio de E-movado en nia regiono.

Rafija Kudrjavceva (Jekaterinburg)

LA MOVADO EN RUSIO – ESPEROJ KAJ MALESPEROJ

malnovaj ideoj en novaj kondiĉoj

Ĵetante en akvon ŝtonetojn, rigardu la cirklojn, kiujn ili faras; aliokaze tia ĵetado restos vanta amuzo.

K.Prutkov

Jen finiĝis la Kongreso kaj la Konferenco de REU. Kaj aperis pli multe da demandoj, ol respondoj. La plej gravaj inter tiuj demandoj – kien ni iras kaj kion fari? (la alia klasika demando "Kiu kulpas?" ne estas, laŭ mi, korekta demando).

En sia raporto (aperis en REGo № 1 (20), 2004) la prezidanto Gudskov menciis kelkajn sukcesojn, ili estas belaj kaj ĝojigas-esperigas: renkontiĝoj, konferencoj[1], eldonado, instru-metodika laboro…

Prezidanto-pesimisto

En la sama numero aperis la artikolo de N.Gudskov "Meditoj kaj konsideroj pri la movado kaj Asocio en Rusio". Jam en la komenco Gudskov asertas (kaj poste ripetas, kvazaŭ preĝon), ke "nia movado estas esence amatora", kaj klarigas: "Ĉar esperoj ricevi ian subtenon de mecenatoj aŭ de la ŝtato estas efemeraj". Nu, pri ĉi-lasta oni diskutu iom poste, sed mi supozas, ke eraro kuŝas jam en la aserto mem! Jes, la movado estas, bedaŭrinde, amatora, eĉ tro, sed tio ne estas nepra stato de la organizaĵo: en la mondo kaj en Rusio ekzistas miloj da multe pli malgrandaj organizaĵoj, sed pli bone organizitaj – ankaŭ de la financa vidpunkto. Certe, se akcepti ĉi aserton plus la sekvan, ke por la asocio principe sufiĉas esti "aro da abonantoj", oni povas multe ĝoji kaj orgojli pro iu ajn sukceso-sukceseto, eĉ hazarda kaj neatendita… Bedaŭrinde (sed logike) la artikolo finiĝas per senespereco ("La tuta movado en Rusio ne estas esperiga"). Se tiel parolus iamaj SEJM-aktivuloj, kiuj agis en malpli favoraj kondiĉoj, la movado apenaŭ elvivus… Mi supozas, ke se la prezidanto estas konvinkita, ke li faras sizifan laboron, li vane prenas sur siajn ŝultrojn tiom pezan ŝtonon.

Kaj jes ja, estas ankoraŭ homoj agemaj kaj sindonemaj en nia rondo! Kaj Irina Gonĉarova, kaj Mikaelo Bronŝtejn, kaj Garik Kokolija, kaj Nikolao mem, kaj Viktoro Aroloviĉ, kaj Mikaelo Ĉertilov, kaj multaj aliaj!

Iom da historio

Antaŭ sep jaroj oni elektis min la prezidanto de REU. Ve, mankis sperto; ve, tro haste (dum dek minutoj!) estis kolektita estrara teamo (iuj rifuzis eniri, iuj eniris iom hazarde), en kiu kelkaj faris tute nenion; mankis mono – la stato de la organizaĵo estis malbona en multaj sencoj. Oni diras: "Komenco bona – laboro duona",

[1] Mi insiste korektas la eraron en la raporto (REGo № 1 (20), 2004, p. 12): ne "La unuan fojon en la historio Rusia Esperantista Unio oficiale partoprenis en granda neesperantista aranĝo…".

sed estis malfacile ja komenci, se anstataŭ helpo oni tuj ricevis malobjektivan kritikon, eĉ atakojn kaj kalumniojn flanke de la eksprezidanto kaj lia eldonaĵo: liaj ambicioj ne toleris, ke ne li estis reelektita, kaj eĉ post jaroj en iu broŝuraĉo li skribis, ke la imponaj planoj de la Estraro restis surpapere, kaj oni elektis la novan Estraron – io tia, ŝajnas. Mi ne certas pri ĝusteco, nur pri tio, ke li denove mensogis, ĉar ja oni reelektis poste min kaj kelkajn el la sama Estraro… Nu, ne pri mensogoj de kamarado Korĵenkov (mi havas kialojn supozi, ke li preferas tian alparolon) nun temas.

La unua, kion mi faris – kompilis la koncepton de nia movado en la modernaj kondiĉoj, ellaboris iujn strategiajn taskojn. Mi ricevis tiam multajn pozitivajn reagojn – ĉefe de la eksterlandaj samideanoj, kiuj jam spertis similajn problemojn[1]. Kaj mi vidas, ke multaj pozicioj de tiu plano restas aktualaj ĝis nun, kvankam dum lastaj jaroj okazis multaj ŝanĝoj kaj en la mondo, kaj en la lando, kaj en REU.

Mi volas memorigi kelkajn el ili[2]:

NIAJ PRIORITATOJ

Pli da atento al amaskomunikiloj

Mi pensas, ke tiu parto de la programo estas absolute klara kaj certe necesa. Mi estas certa, ke televida-gazetara-radia bombardado estas unu el la plej gravaj flankoj de nia agado. En ĉiuj niveloj de amaskomunikiloj – tutlanda, regiona, respublika, urba ktp.

Pli vasta uzo de E-o en ĉiuj flankoj de la agado

Mi pensis, ke ankaŭ tiu ĉi parto estas memkomprenebla, sed evidentiĝis, ke ne por ĉiuj.

Do, faka aplikado de E-o. Ĉu ne estas memkomprenebla, ke sen uzo de E-o en la vivo ĝi restos ludilo por la ŝatantoj, sed ne vera ilo? Mi citos s-ron M.Fettes, estraranon de UEA: “Mi tute ne neas, ke la Esperanto-komunumo ekzistas kaj rajtas evolui laŭ la propraj leĝoj kaj bezonoj. Mi ne neas, ke ankaŭ UEA havas siajn devojn al tiu komunumo. Mi tamen asertas, ke la Esperanto-m o v a d o (alia koncepto ol komunumo) portas respondecon multe pli larĝan kaj havas kelkajn bezonojn radikale malsimilajn.” Mi estas certa, ke nur uzante la lingvon en ĉiuj eblaj sferoj de la viva vivo – scienco, tekniko, politiko, komerco, turismo ktp., ktp. oni povas doni al ĝi tiun veran vivon, kiun ĝi indas. Ĉu ne utilon de E-o kaj bezonon de la internacia lingvo en ciuj sferoj de la vivo ni deklaras en ĉiuj niaj propagandiloj?

Ne multajn homojn interesus E-o, se oni nur maĉadus pri ĝia utileco kaj perfekteco kiel interkomprenilo. Malmultaj estus ĝiaj adeptoj, se oni ok-

---

[1] Jun 09 11:55:15 1997
Estimata amiko,
permesu al mi gratuli vin pro via valora artikolo aperinta en “Eventoj”. Ĝi donas bonegan superrigardon pri nia stato kaj mi plene konsentas pri la farendoj.
Amike: Geza KURUCZ, red. de “Juna Amiko”

[2] A.Junusov. Niaj prioritatoj. 1997. Mallongigite.

upiĝus pri E-o nur por agrable pasigi tempon inter geamikoj. Sed mi ja diras pri la evidenta. Kaj la sperto de aliaj landaj asocioj montras, ke vere tio estas kaj grava kaj ebla! Do, ni povas konstati, ke ĝis nun nia Unio ne multon faris tiudirekte, sed ni ja vivas en la tempo, kiam jam ne sufiĉas konvinki homojn per la vortoj, necesas m o n t r i E-on kiel vivan kaj utilan rimedon! *"Por kio ekzistu komuna lingvo? Vojaĝado, Komerco, Negocado, Neŭtrala Dokumentado, Internaciaj kontraktoj, translimaj radioinformoj, mondaj komputilaj retoj, direktado en aviado..."* (Will Green. "Kiel, kien, kion?" – "Eventoj"-84).

Financa plifortigo de la organizo, pli da atento al entreprenado

Estas iom stranga deklaro – kategoria malkonsento kun tiu parto de mia programo, kaj samtempa esprimo de espero, ke "... firmigo de la asocia financo... trovos sian daŭrigon". Kiel (kaj kion!) do "firmigi"? Nur kolektante kotizojn kaj havante en la asocia buĝeto ridindan sumon?

Kial propono pri la normala kaj en nia nuntempa realeco kaj preskaŭ en la tuta mondo serĉado de sponsoroj, ricevado de la subvencioj kaj esplorado pri ebloj de E-entreprenado, eĉ stimulado de la entreprenado en kadro de REU estas renkontata kiel bombo? Kial miaj citaĵoj ĉi-temaj el nia propra Statuto de REU (!) estis nomitaj "absurdaj" ĝuste de tiu persono, kiu ludis ne la plej lastan rolon en la prilaborado de la Statuto? Do, ni "plifirmigu"...

> Fianĉo al la fianĉina patro:
> – Mi petas la manon de via filino.
> – Sed ĉu vi estas sufiĉe bonstata por vivteni la familion?
> – Mi opinias, ke jes.
> – Pripensu bone: en nia familio estas sep personoj.

Ni havas en la Unio entreprenemajn homojn. Kial ne subteni reciproke – la Unio – ilin, ili – la Union? Kial ne havi propran turisman, ekzemple, firmaon **en** la Unio? Kaj oni povus trovi ankoraŭ multajn aliajn eblojn. Sed eĉ tiuj, kiuj estas menciitaj en la Statuto, estas neglektataj! *"Nia ĉefa espero kuŝas ĉe negocistoj, komercaj, edukaj kaj politikaj. Ni devas konvinki la homojn, kiuj havas potencon super decidoj. Ankaŭ ĵurnalistojn".* (Will Green).

Ni rigardu la fremdan sperton, se mankas la propra, vidu la agadon de IFEF, TAKE... Vidu, kiel rapide faris la "perestrojkon" la belgiaj samideanoj, kiam la ŝtato postulis de ili fari servojn por ne-esperantista publiko por daŭre ricevadi la subvenciojn...

Rekonsideri perspektivojn de REU, renovigi interklubajn ligojn, subteni konkuradon inter kluboj

Pri tio diris ne nur mi. Unue pri tio diras nia propra iama sperto. *"SEJM... Por multaj esperantistoj de nia lando tio ne estas iaj sonoj, iaj neklaraj literoj. Pli ol 10 jarojn fakte tuta nia lando estis strukturigita en tiu neoficiala organizaĵo kaj sekvis ĝiajn leĝojn. Verŝajne, ne estos la eraro nomi tiun periodon de nia landa postmilita E-movado la plej interesa kaj enhavriĉa."* (D.Cibulevskij. "SEJM. Historia skizo".)

En la tempoj de SEJM ĝuste interklubaj ligoj, ĝuste tiu parto de la laboro faris el unuopaj e-istoj kaj kluboj fortan movadon! Ne vane la popola saĝulo diris: *"Kiu pafos en pasintecon el pistolo, tiun estonteco pafos el kanono".* De la pratempoj ĝis nun, en ĉiuj partoj de la tero la konkurado stimulis agadon!

Laboro kun la parlamentanoj, soci-politikaj agantoj kaj organizaĵoj

Mi pensas, ke en reala socio pensi, ke ni estas robinzonoj, kiuj vivas izole sur la bela insulo "Esperantujo", estas simple stulte (kvankam tio certe varmigas niajn romantikajn korojn...). Strebi utiligi E-on kaj neglekti sociajn realojn, agadi en vakuo aŭ inter si mem estas vana iluzio. Ĉu ni devas konvinki nin mem pri la rolo de E-o, ĝia utilo ktp.? Laboro kun la parlamentanoj, kun sociaj kaj politikaj agantoj estas necesa parto de la laboro **por** E-o. Ni rememoru la faman kaj gloran sukceson de Ivo Lapenna ĉe UNESKO en Montevideo kaj similan – de Tibor Sekelj. Ni vidu la nunan agadon de s-ro Germain Pirlot el Oostende, Belgio kun la eŭroparlamentanoj. Pri aktiveco en rilatoj kun la ekstermovada publiko estas menciata en pluraj dokumentoj de UEA (vd., ekz. Enkondukon en la Manlibro de la Informa Fako de UEA pri la mondvasta reto de aktivuloj: *"Nur du ecoj necesas por membreco en tiu reto: a) a k t i v e c o en rilatoj kun la ekstermovada publiko, kaj b) kunlaboremo..."* (M.Fettes, januaro 1993)). La artikolo de la Prezidanto de UEA "Esperanto en 1996" (Eventoj 1/97) komenciĝas per la vortoj: "En 1996 estis speciale fruktodonaj rilatoj inter esperantistoj kaj internaciaj organizaĵoj. Iuj kredis vidi la komencon de nova epoko en la rilatoj kun UNESKO". Tio sendube montras, ke la interrilatoj kun la gravaj politikaj organizaĵoj meritas apartan atenton. En la sama artikolo vi tuj rimarkos ankaŭ la vortojn pri la laboro kun la Eŭropa Parlamento kaj universitatoj, pri AIS ktp. Ĉu iu havas iluziojn, ke sen aprobo de grandaj sociaj, kulturaj, politikaj agantoj eblas vera agnosko en supera nivelo? Kiel Komunaj prioritatoj de la Informa Fako de UEA aparta linio estas dediĉita al "uzo de simpatiantoj de Esperanto" (!). (Ivo Durwael, 16.09.1991).

Do, mi estas certa, ke ni devas fari tiujn provojn, alvoki intereson al la lingvaj problemoj (kiuj multobliĝas en la nuna situacio de ĉiam pli granda intereso de pluraj popoloj de nia lando al la propraj lingvoj, historioj k.s.).

Kompreneble, mi povas erari. Kaj mi ŝatus pridiskuton de ĉi programo. Iun ajn pozitivan, konstruivan kritikon, kiu estus utila, mi akceptos kun dankemo.

Abduraĥman Junusov, prezidanto de REU

Kio ŝanĝiĝis?

Relegante ĉi programon, mi konstatas, ke ne multo ŝanĝiĝis. Antaŭ unu jaro mi kritikis tiaman Estraron de REU pro preterlasitaj ebloj – mi tamen ripetos tion, ĉar estas sufiĉe klara ilustraĵo. Unue, oni preterlasis eblon kolekti esperantistojn en Moskvo dum la Civitana Forumo – grandskala kunveno de la reprezentantoj de la plej diversaj sociaj organizaĵoj en Kremlo. Esprimaĵoj, ke *"tio estis ago de Kremlo*

por subteno de la Prezidento" k.s. estas neseriozaj kaj eĉ ridindaj – neniu ja proponis fari ion politikan. Krome, la Forumon partoprenis eĉ la reprezentantoj de la sufiĉe radikalaj homrajtaj organizaĵoj, kiuj ja tute ne estas adeptoj de la Prezidento. Temis pri tio, ke oni ignoris la eblon kolektiĝi almenaŭ foje ne kontraŭ propra mono (ni ja estas mizera organizaĵo de la financa vidpunkto!), sed je konto de la ŝtato. Kaj, due, eĉ pli grave – uzi eblon rekte propagandi por la bonega celgrupo – sociaj agantoj, disdonante informilojn, diskutante ktp.

Eterna amatoreco?

La dua serioza kritiko estis pri tio, ke ni ne uzis la eblon havi du paĝojn senpage en ĉiusemajna ruslingva homrajta gazeto, kiu estus distribuata ĉefe en la Suda Federa Regiono. Estis strange aŭdi "argumentojn", ke tio postulos fari financraportojn ktp. – iuj ajn firmaoj, organizaĵoj ktp. en la mondo faras tion, se volas ion fari!

La socia kampo

La Konferenco pasintjara akceptis miajn pledojn por la kunlaboro kun la sociaj organizaĵoj, institucioj. Mi estis elektita vicprezidanto de REU kun la ĉef-tasko daŭrigi tiun agadon. Mi faris tion. Krom la starigo de bonaj rilatoj kun la Moskva Helsinkia Grupo (MHG), "Memorialo", Sankt-Peterburga politologia Centro 'Strategio" mi organizis kune kun MHG kaj dagestanaj sciencistoj la Konferencon "La lingvoj kaj kulturoj en la 21-a jc." ktp. Dum la tiujara Konferenco de REU oni akceptis ankaŭ ideon, ke necesas ankaŭ trovi iun kunlaboron kun la ŝtataj organizaĵoj (malgraŭ, ke iuj homoj en la Estraro deklaras, ke ne volas kunlabori kun la ŝtato, en kiu vivas…).

Sed jen pasis jaro, kaj dum la nova Konferenco de REU – la malnovaj diskutoj. En la estrara raporto la prezidanto Gudskov substrekis, ke nia organizacio estas "esence amatora", kaj ke ĉie estas same. Mi konsentas pri nia amatoreco, sed tiel estas ne ĉie. Estis menciitaj la ideoj de E.Perevertajlo pri apliko de E-o, pri kiuj ĉiam pledis mi. Nur la vera aplikado povas porti veran utilon!

Intimaj elektoj. Ĉu ni elektis haremon?

La elektoj mem, laŭ mi, estis iom strangaj. Jen kelkaj momentoj, pro kiuj mi tiel supozas.

La prezidanto Gudskov, proponante la kandidatojn por la Estraro, ĉiam emfazis, ke li kun tiu persono "intime bone laboras". Finfine Valentin Seguru eĉ koleriĝis, kaj kelkfoje demandis, kial Gudskov ĉiam emfazas pri la intimeco? (Vere, oni ja ne haremon elektas por sultano, sed la estraron de organizaĵo en la granda lando!).

Due. Oni proponis elekti min denove vicprezidanto. Estis honte kontempladi, kiel la nova-malnova prezidanto dum la tuta horo marĉandas kun Kokolija, ke Garik konsentu ankaŭ balotiĝi kiel vicprezidanto, nur por ke ne estu elektita mi, kiel li uzis ĉiujn kaj ĉiajn rimedojn, eĉ kaptante la homon, kiu ne partoprenis en la diskutado, sed estis preterkuranta… (En la krampoj mi menciu, ke kelkaj el la konferencanoj eĉ ne komprenis, pri kio temas, ĉar… ne parolis Esperante…) Rezulte – po dek voĉoj por ambaŭ, kaj stranga decido tiuokaze resti sen vicprezidanto ĝenerale! (Pasintjare estis eĉ du.) Ĉu ne estas en la lando aliaj kandidatoj?

Kial mi ne (balot)iĝis estrarano?

Mi ŝatus klarigi la motivojn, kial mi konsentis balotiĝi kiel vicprezidanto, sed definitive ne – kiel estrarano.

Unue, mi supozas, ke kiel vicprezidanto mi povus tamen defendi iujn el tiuj opinioj, kiujn mi esprimis supre. Sed ne mekanike voĉdonante pri iuj decidoj, ellaboritaj de lia prezidanta moŝto en la "intima moskva rondo".

Due. Mi ne bezonas iun apartan titolon en Esperantujo, kie por mi plene sufiĉas mia propra nomo. Kaj en mia profesia kaj socia vivo mi havas sufiĉe da plej diversaj titoloj por kontentigi iajn ajn ambiciojn. Sed mi sincere konsentis antaŭ unu jaro, ke tiu ĉi posteno permesos al mi intertraktadi la aferojn kun la homoj, de kiuj dependas decidoj en la sufiĉe alta nivelo. De tiu ĉi vidpunkto nuligo de la posteno donis nenian pozitivan rezulton al la REU-agado. Sed la malbonan – jes. Apenaŭ mi povos denove proponadi rezoluciojn pri E-o dum la internaciaj konferencoj de la neregistaraj kaj registaraj organizaĵoj, apenaŭ mi povos en ĉi kondiĉoj organizi la Duan konferencon pri Lingvoj kaj Kulturoj en tiu nivelo, en kiu esperis post la Unua… Tio, kompreneble, koncernas iun ajn alian personon, kiu estus elektita anstataŭ mi aŭ Garik.

Sed eĉ pli gravas, ke kun tia sinteno, kun tia rilato al la starantaj problemoj flanke de kelkaj estraranoj nia agado ankoraŭ longe restos amatoreca kaj mizera.

Interalie, nur pro mizero de la organizacio ni denove suferis dum la Konferenco pro malvarmo kaj aĉaj kondiĉoj (tio estas riproĉo ne por la volgogradaj organizantoj – ili strebis fari ĉion, sed kion oni povas fari sen financa subteno?). Aparte oni povus paroli pri la preskaŭ nula lingva nivelo de plimulto de la partoprenintoj (temas kaj pri REK, kaj pri la Konferenco, kaj pri EoLA), kaj pri la programo de la festivalo…

Laŭ mi, restas la samaj prioritatoj – ekstera informado, praktika aplikado en ĉiuj sferoj de la vivo, la klubaj interligoj, financa plifortiĝo. Cetere, la Konferenco komisiis al la Estraro ellabori koncepton kaj strategian planon por nia movado en la nunaj kondiĉoj. Do, la diskuto daŭras.

Abdurahman Junusov (Maĥaĉkala)
prezidanto de Inform-analiza Centro "Rakurs"

UNIVERSALA KONGRESO EN 2006 EN FIRENZE

La Estraro de UEA akceptis la inviton de Itala Esperanto-Federacio okazigi la 91-an Universalan Kongreson de Esperanto en Florenco de la 29-a de julio ĝis la 5-a de aŭgusto 2006.

Italiaj esperantistoj jam komencis labori por ke la kongreso estu epokfara, kaj la premisoj montras ke certe temos pri tre zorge preparata kongreso.

Fakte en la LKK (Landa Kongresa Komitato) aniĝas internacie konataj aktivuloj, sub la reĝisorado, en la rolo de sekretario, de Diccon Mastermann, iama Konstanta Kongresa Sekretario ĉe UEA kaj poste estrarano de UEA pri kongresoj.

La fakto, ke ĉi-jare li ankaŭ kandidatiĝas kiel B-komitatano, montras lian decidon plentempe sin dediĉi al Esperanto-movado en venontaj jaroj!

Michela Lipari (Italio)

NOVAĴOJ PRI RET-04

Aperis la ttt-ejo <www.ret-04.narod.ru>, kie eblas trovi ĉiujn bezonatajn informojn kaj novaĵojn pri la aranĝo, aliĝilon, programon, interesajn informojn pri Tiĥvin, liston de aliĝintoj (eĉ la fotojn de iuj el ili).

Jam estas subskribita la kontrakto kun OOO "Glinozem", posedanto de la ripozejo, en kiu okazos RET-04.

Al la aranĝo jam aliĝis pli ol 30 personoj. Inter la unuaj aliĝintoj estas Mikaelo Bronŝtejn, Valerija Cvetkova, Bronislav Ĉupin, Garik Kokolija, Vladimir Samodaj, multaj konataj tiĥvinanoj kaj peterburganoj.

Por la programo de RET-04 jam venis multaj interesaj proponoj: de V.Samodaj – Fotoekspozicio, Prelego "Kvar E-organizaĵoj, kiujn mi kungvidis dum la lasta duonjarcento", Lumbilda rakonto "La regiono de mil kaj unu noktoj"; de V.Cvetkova – "Sieĝo de Leningrado" (rakonto de la travivinto), "Mia panjo Barbara" (kun ekspozicio de pentraĵoj); de M.Bronŝtejn – Majstro-klaso pri poezia tradukarto, "La mondo de E-insignoj" (ekspozicio-rakonto); de Ĵomart kaj Nataŝa – koncerto. Okazos ankaŭ koncerto de Andrej Korobejnikov (Moskvo) – tre talenta juna muzikisto kaj esperantisto, kiu jam kelkfoje koncertis dum Universalaj Kongresoj de Esperanto. Krome en RET-programo estas antaŭvidataj artaj aranĝoj, prelegoj, diskutoj, KGS, lignofajroj, sportaj konkursoj, ekskursoj (al Tiĥvina vira monaĥejo kaj al la muzeo de N.A.Rimskij-Korsakov), diversnivelaj E-kursoj kaj ĈALK-ekzamenoj, intelektaj ludoj, barda kafejo, registrado de la kantistoj, kiuj venos al RET, en la studio de la Artlernejo nome de Rimskij-Korsakov. Okazigo de fiŝkaptado, boatado kaj berkolektado memkomprenblas.

partopreno de Ĵomart kaj Nataŝa en RET-02 lasis neforgeseblan impreson kaj ĉe ili kaj ĉe ĉiuj ni

RET-Premio. Serioza tiĥvinano, simpatianto de Esperanto donacis startan kapitalon de 10 000 rubloj speciale por lanĉi la fonduson "RET-Premio". La organizantoj decidis, ke la fonduso servu al subteno de E-kulturo, la fonduson rajtas partopreni per monsubvencio ĉiu esperantisto aŭ simpatianto de Esperanto. Ankoraŭ ne estas akceptita la findecido pri la sistemo por aljuĝo de la premio(j). La proponitaj variantoj estas: unusola premio (aŭ tri premioj) por la plej aktiva(j) RET-ano(j); unusola premio por la plej bona metodiko de E-instruado; laŭbranĉaj premioj (literaturo, muziko, teatro, metodiko de instruado).

La organizantoj speciale kaj antaŭdanke invitas la veteranojn de SEJT-18, okazinta apud Tiĥvin (1976). Estas planata vizito al la memorplaco de SEJT-18.

DECIDOJ DE LA 20-A KONFERENCO DE REU

okazinta 21-24.02.2004 en Volgograd

1. Taksi la laboron de la Estraro kontentiga.

2. Aprobi la raporton de la Kontrol-revizia Komisiono.

3. Elekti la Estraron en la konsisto: Nikolao Gudskov – Prezidanto (ĝenerala kunordigo de ĉiuj labordirektoj); Mikaelo Ĉertilov (faka aplikado, financoj, individuaj kontoj, membroregistrado), Irina Gonĉarova (instru-metodika laboro, kontaktoj kun REJM), Jurij Karcev (Libroservo), Georgij Kokolija (REGo, dissendolistoj, amasaj aranĝoj), Viktor Kudrjavcev (regiona agado), Valentin Seguru (kontaktoj kun oficialaj instancoj).

nova Estraro de REU tostas

4. Elekti la Kontrol-revizian Komisionon en la konsisto: Roman Bolŝakov – prezidanto, Rafija Kudrjavceva, Boris Zozulja.

5. Elekti Komisiitojn pri: dokumentado – Viktor Aroloviĉ, rilatoj kun amaskomunikiloj kaj neregistaraj organizoj – Abduraĥman Junusov, kultura agado – Mikaelo Bronŝtejn, medicinista agado – Pavel Volkov, turismo – Anna Butkeviĉ, laboro kun infanoj – Irina Mironova.

6. Komisii al la Estraro nomumi Komisiitojn pri la Kluba Ranglisto kaj pri TTT-paĝaro de REU.

7. Elekti Georgij Kokolija kiel A-komitatanon de UEA.

8. Akcepti Regularojn: “Regularo de REU pri la Kluba Ranglisto”, “Regularo de REU pri la fonduso “Kluba Ranglisto””, “Regularo de REU pri la fonduso “Dumvivaj membroj””.

9. Rekomendi al la Estraro ellabori koncepton de ĝenerala strategio de REU en modernaj kondiĉoj.

10. Rekomendi al la Estraro aktivigi la laboron en direkto “faka aplikado de Esperanto” enkadre de la Strategia Laborplano de UEA.

11. Rekomendi al la Estraro forpreni al REU la posedrajton por la ret-paĝaro de REU.

12. Establi sistemon de individuaj kontoj ĉe REU.

13. Komisii al A.Junusov esplori eblecon ricevi subvenciojn por REU kaj samtempe komisii al N.Gudskov esplori la eblecon reakiri la konton aŭ subkonton de REU.

Dum la 20-a REU-Konferenco, kiam estis diskutitaj la Komisiitoj kaj Komisionoj de REU, sonis ŝerca propono instali "Komisionon pri senkompata kritiko", kiun povus konsistigi REU-membroj N.Griŝin, V.Melnikov kaj V.Minin.

14. Rekomendi al la Estraro kompili la liston de instruistoj de Esperanto en Rusio.

15. Prepari leteron al Hispania(j) Konsulejo(j) en Rusio por subteni esperantistojn, dezirontajn vojaĝi al la 6-a Eŭropa E-Kongreso en Bilbao.

16. Komisii al V.Seguru konsulti dezirontojn vojaĝi al la 89-a UK en Pekino kaj okazigi eventualan helpon pri vizoj.

REZULTOJ DE LA RANGLISTO KLUBA POR 2003

1. E-klubo MASI (Moskvo) – 784 poentoj

2. VEJC "Stelaro" (Volgograd) – 512 poentoj

3. E-klubo "Pacifiko" (Vladivostok) – 418 poentoj

4-5. SEO (Samara) – 406 poentoj

4-5. Tiĥvina E-klubo – 406 poentoj

GRATULOJN AL ĈIUJ KLUBOJ!

FARU LA RONDON!

Meze de marto en Moskvo finiĝis la 9-a FaRo – intensiva E-kurso por novuloj, gvidata de profesia Esperanta instruistino Irina Gonĉarova. La unikan kaj riĉenhavan kurson finis 13 personoj, kiuj dum 10 vesperoj post plenŝtopitaj streĉaj labortagoj entuziasme venadis al la kurso, brile preparita de Irina. Eĉ ne unu litero, vorto aŭ frazo estis skribita sur tabulo, en kajeroj aŭ ie ajn. Dum ĉiu leciono sonis nur Esperanto, kaj la gejunuloj senĝene paroletis, dialogis, ludis, kantis, komprenante preskaŭ ĉion. Ĉiu leciono enhavis ege riĉan vort- kaj gramatik-materialon, pluse – freŝaj, originalaj lingvaj ludoj, langrompiloj, modernaj bildoj, atentokaptaj situacioj. Por malstreĉiĝo tute ne lacige, tenere, sonis mildaj kantoj de rusiaj kantistoj. Brile!

Preskaŭ ĉiulecione la teamanoj – eksaj kursanoj de iamaj FaRoj – helpis aranĝi kaj pliriĉigi la Esperantan etoson. Unikeco de la kurso konsistas

en tio, ke la instruado pasas en amika rondo, kiu kreas kluban etoson. Tre trafaj kaj tute neforgeseblaj nomoj de la kursanoj, ekzemple, Just Sagaca, "juristo el Britio", aŭ Milda Tuŝi-Puŝi, "skulptistino el Usono", komence mirigis onin kaj ne al ĉiuj kursanoj plaĉis. Fine de la FaRo-9 oni ne nur enamiĝis al sia "legenda" nomo, sed multaj preferas lasi ĝin por la plua esperantista vivo. Problemo? Tute ne! Tamen, tion la ĉarma, sed rigora Mirinda Strigo (legu: la instruistino) permesas nur post sukcesa plenumo de certaj taskoj en la Lingva Olimpiko fine de la kurso. Rapide kaj nerimarkeble pasis FaRo-9... Kolosa laboro de la sperta instruistino! Temporaba, sed – plenrezulta! Novaj freŝaj fortoj enfluas la moskvan Esperantan Klubon "MASI" kaj rusian movadon. Preskaŭ en ĉiu enketilo fine de la kurso la studantoj skribis pri sia deziro plu lerni Esperanton. Post nelonga paŭzo la novbakitaj esperantistoj venos al la daŭriga kurso de Irina Gonĉarova. Glorinda laboro!

Svetlana Smetanina (Moskvo)

ĈALK-EKZAMENOJ

Dum REK-EoLA en Volgograd, la 25-an de februaro, okazis ekzamenoj de la Ĉefa Atesta kaj Lingva Komisiono de REU. Enskribiĝis 15 personoj el Volgograd, Ĉeboksari kaj Jelec, el kiuj 14 – por A-nivelo (elementa) kaj 1 – por B-nivelo (meza instrurajtiga). Sukcese faris la ekzamenon 10 personoj por A-nivelo (la ekzamena komisiono – N.Gudskov kaj B.Ĉupin) kun sekvaj rezultoj: Ĉugunkina Oljga (Volgograd) – perfekte, Fedotova Aleksandra (Ĉeboksari) – perfekte, Kolesnikov Anton (Volgograd) – bone, Konstantinov Anton (Ĉeboksari) – perfekte, Krasnokutskij Anatolij (Volgograd) – perfekte, Semjonova Irina (Ĉeboksari) – perfekte, Ŝirjaeva Jevgenija (Volgograd) – perfekte, Tikeeva Saule (Volgograd) – perfekte, Vnukov Vjaĉeslav (Volgograd) – bone, Vasiljeva Alina (Ĉeboksari) – perfekte. ĈALK gratulas!

Necesas noti, ke plejparto de la ekzamenitoj (eĉ kun perfektaj notoj) evidente ne sufiĉe orientiĝas pri la aktuala E-movado en la mondo ĝenerale kaj en Rusio aparte, ne konas eĉ gvidorganojn de REJM kaj povas miksi SEJT-on kun SAT. Preskaŭ neniu kapablis precize diri naskiĝjaron kaj naskiĝtagon de L.Zamenhof! Do, en Volgograd kaj Ĉeboksari oni eĉ ne festas Zamenhof-Tagon aŭ ne klarigas ties signifon al novuloj. Karaj instruistoj kaj klubgvidantoj, bonvolu pli atenti pri la neceso por la komencantoj almenaŭ ion elementan scii pri tiu komunumo, kiun ili eniras!

N.Gudskov (Moskvo), prezidanto de ĈALK

LABORPLANO DE REU

por la jaro 2004 kaj komenco de 2005

Eldona kaj kultura agado:

1. Jarlibro-2004 – majo.
2. Manlibro (2-a, aktualigita eldono) – majo.
3. REGo (6 numeroj jare).
4. Rearanĝo kaj aktualigo de la ret-paĝaro <www.reu.ru> – aprilo-majo; regula aperigado de novaĵoj en ĝi – dumjare.
5. Helpo en preparado de la paĝaro <www.moskvo.ru> – marto-junio.

6. Preparo kaj aperigo de nova disko en la serio “Oraj kantoj” – dumjare.

7. Finpreparo kaj aperigo de la poezia antologio “Moskvaj sonoriloj” – somero 2004.

8. Plurlingva broŝuro kun materialoj de sciencaj konferencoj pri minoritataj lingvoj (Maĥaĉkala 2003, Ĉeboksari 2004) – decembro 2004 – januaro 2005.

9. Lanĉo de konkurso por junaj verkemuloj – somere 2004 (kun REJM).

Aranĝoj:

1. Regiona renkontiĝo “Esperantista Printempo en Uralo” – majo 2004.

2. Helpo al MASI kaj REJM en preparado de Moskva AntaŭKongreso kaj Internacia Junulara Kongreso – julio 2004.

3. Rusiaj Esperanto-Tagoj (RET-04) – aŭgusto 2004.

4. Partopreno en organizo de la konferenco pri minoritataj lingvoj en Ĉeboksari – oktobro 2004.

5. Partopreno en organizo de STRIGo-10 – novembro 2004.

6. EoLA-17 – printempo 2005 (laŭ interkonsento kun REJM).

7. REK-24 – printempo 2005 (laŭ interkonsento kun REJM).

Instru-metodika laboro:

1. Krei profitdonan E-centron en Moskvo – ĝis septempbo 2004.

2. Lanĉi E-kurson en Moskva Ŝtata Pedagogia Universitato – aŭtune 2004.

3. Kolekti informon pri Esperanto-instruistoj, instruintoj kaj instruantoj (per REU, REGo-artikolo kaj konataj esperantistoj).

4. Fari adresaron de la trovitaj instruistoj kaj kontakti ilin, por kio verki specialan demandaron.

5. Fari metodikan bibliotekon el donacoj de la instruantoj, t.e. kolekti diversajn metodikajn materialojn, ie kaj iam publikigitajn aŭ verkitajn de instruantoj (-intoj, -istoj) mem, kaj sistemigi ilin.

6. Organizi metodikan analizon de ricevita materialo fare de profesiaj instruistoj.

7. Renaski LETojn kiel ĉiujaran tendaron por lernejanoj de la somero 2005.

8. Organizi inform-metodikan interŝanĝon inter instruantoj.

9. Serĉi eblon por publikigado kaj disvastigado de la plej bonaj metodikaj materialoj.

10. Dum grandaj E-aranĝoj organizi infanajn E-grupojn, okupiĝantajn pri la lingvo, ludoj, teatraĵetoj k.t.p.

Kluba kaj regiona agado:

1. Aktualigi liston de E-kluboj en la lando – majo.

2. Okazigi la interkluban konkuradon – decembro.

3. Daŭrigi kaj vastigi regionajn renkontiĝojn en 2005.

Eksteraj rilatoj:

1. Organizi disvastigon de priesperantaj informoj al rusiaj politikistoj enkadre de Ago-Tago.

2. Organizi gazetaran konferencon pri Esperanto en oktobro 2004.

3. Daŭrigi la informadon pri E-o en junularaj medioj – dumjare (kun MASI).

4. Partopreni eventuale okazontajn konferencojn de neregistaraj organizoj kun disvastigo de informoj pri E-o – dumjare.

5. Prezentadi atingojn de la rusia esperantistaro en eksterlandaj E-aranĝoj – dumjare.

Faka aplikado

1. Trovi kunlaborantojn enkadre de Esperanto-Servocentro kun la celo fondi REU-sekcion pri faka aplikado.

2. Fari liston de reprezentantoj (perantoj) de fakaj asocioj en Rusio kaj publikigi ĝin.

3. Esplori eblojn de kunlaboro de REU kun Fakaj asocioj de UEA pere de ties reprezentantoj (perantoj) en Rusio aŭ senpere. Proponi komunajn projektojn por la Estraro.

4. Laŭeble subteni fakan aplikadon de Esperanto inter neesperantistoj enkadre de Esperanto-Servocentro kaj aliaj projektoj.

BUĜETO DE REU POR 2004

ĉiuj sumoj estas en rusiaj rubloj

ELSPEZOJ

Eldono de informiloj, aliĝiloj k.t.p.	– 11000
Poŝtelspezoj, telefonado k.t.p. (Estraro kaj Komisiitoj)	– 1500
Membrokartoj, papero kaj kancelariaĵoj	– 1000
Bankaj elspezoj	– 400
Kotizo al UEA	– 2200
Investo en fondusojn	– 1000
Investo en projektojn (tutrusiajn)	– 3000
Subteno de kluba agado	– 2000
Subteno de regiona agado	– 2000
Abono de REGo por DM	– 1000
Elspezoj rilataj al la retpaĝoj de REU	– 2000
Sume	– 27100

ENSPEZOJ

Kotizoj individuaj	– 6000
Kotizoj klubaj	– 5000
Libroservo	– 5000
ĈALK	– 500
Profito de la aranĝoj	– 5000
Rento de la fondaĵoj	– 1300
Subvencioj, donacoj	– 4300
Sume	– 27100

REU-KONTOJ EKFUNKCIIS

Por faciligi transpagojn ĉe REU funkcias servo de individuaj reu-kontoj. Iu ajn povas meti al propra individua konto ajnan sumon. Por fari pagon de sia konto sufiĉas komisii tion al la kasisto de REU Mikaelo Ĉertilov <mikaelo.km.ru>. Internaj pagoj (de unu reu-konto al la alia), kotizoj al UEA, UK, abonoj de revuoj (la liston vidu en la Jarlibro) estas senpagaj. Eksteraj pagoj ne estas senpagaj (ekz. transpago de reu-konto al uea-konto aŭ fel-konto kostas 5% de la ĝirata sumo). Individuaj kontoj estas tenataj kaj kalkulataj en eŭroj aŭ rubloj (laŭ elekto de la posedanto). La procentaĵoj pro teno de mono en individua konto ĉe REU mankas. Konvertado de unu valuto al la alia okazas laŭ kurzo de Centra banko de Rusio, anoncita en tago de veno de la mono.

NOVAJ REU-ALIĜOJ POR 2004

DUMVIVA MEMBRO

Jurij Pasečnikov (Tomsk)

ALIĜINTAJ KOLEKTIVOJ

Ivanova E-klubo (12 aligitaj membroj): *Aĥmetova Faina, Aksjonova Vera, Barinova Lola, Kolmakova Marija, Lapŝin Sergej, Maleĵ Tatjana, Obrezkov Andrej, Obrezkova Jelena, Popcova Angelina, Poŝvina Ljubovj, Sadovnikov Artjom, Zaidova Tatjana*

Ivanova Medicinista Esperanta Asocio (IMEA) (+ 8 aligitaj membroj): *Ĵukolina Marija, Ĵuravljov Sergej, Kirillova Anastasija, Masljonkina Natalija, Serebrjanikova Natalija, Starikov Vladimir, Volkova Larisa, Wang Huaj Ju*

Moskva EK MASI (+7 aligitaj membroj): *Graĵdanova Ksenija, Ĥmelevskij Andrej, Marutenkov Pavel, Morozov Dmitrij, Samitova Asja, Smetanina Svetlana, Vasiljeva Tatjana*

Tiĥvina E-klubo (12 aligitaj membroj): *Baraŝkov Vasilij, Belova Tatjana, Bronŝtejn Tatjana, Ĵuravljova Jelena, Kaĉalova Zoja, Koroteckij Aleksandr, Kroljus Tamara, Pirjutko Nina, Rajskaja Natalja, Selivanova Larisa, Vlasova Vera, Zdrogova Nadeĵda*

Volgograda Esperantista Junulara Centro "Stelaro" (10 aligitaj membroj): *Ĉugunkina Anastasija, Ĉugunkina Oljga, Dronova Viktorija, Koĉetkov Aleksandr, Kolosov Eduard, Kolosova Lana, Krasnokutskij Anatolij, Tikejeva Saule, Vnukov Vjaĉeslav, Volodina Tatjana*

Volgograda E-klubo "Espero" (5 membroj): *Bikova Ljudmila, Dumler Vera, Guriljova Dina, Spicina Valentina, Vtorova Tatjana*

INDIVIDUAJ MEMBROJ

Arbekova Katerina (Novosibirsk), Belenjuk Galina (Soĉi), Belenko Anĵela (Novosi-

birsk), Bespalov Vladimir (Soĉi), Bondareva Valentina (Moskvo), Bronŝtejn Mikaelo (Tiĥvin), Ĉajka Oleg (Moskvo), Ĉupin Bronislav (Iĵevsk), Ĉuprakova Nina (Moskvo), Davidov Jurij (Moskvo), Derevjanniĥ Sergej (Moskvo), Edelŝtejn Vladimir (Moskvo), Gonĉarov Anatolij (Krasnojarska reg.), Ilutoviĉ Klara (Moskva reg.), Jaĥina Alla (Krasnojarsk), Junusov Abduraĥman (Maĥaĉkala), Kalaŝnikov Aleksandr (Tjumenj), Kandalinskij Viktor (Tiĥvin), Kivajev Jurij (Marij El), Kostjuk Tamara (Ukrainio), Kudrjavcev Viktor (Jekaterinburg), Kuleŝova Nadeĵda (Sankt-Peterburg), Loskutova Tatjana (Ivanovo), Matusov Jurij (Sankt-Peterburg), Milner Aleksandr (Moskvo), Olejnikova Natalja (Soĉi), Povorin Miĥail (Moskvo), Privalov Vitalij (Kostroma), Privedjonnaja Julija (Moskvo), Roĵdestvenskij Vjaĉeslav (Ĉeljabinsk), Sergejev Sergej (Soĉi), Serova Jelena (Kostroma), Sibirceva Valentina (Lipecka reg.), Skvorcova Natalja (Sankt-Peterburg), Ŝalamova Galina (Rostova reg.), Ŝevĉenko Oljga (Sankt-Peterburg), Tjulaĥov Spartak (Jakutio), Udalova Irina (Taganrog), Vasilenko Lidija (Moskvo), Vasiljev Viktor (Vladimir), Zueva Nina (Jelec)

FAMILIAJ MEMBROJ

Kudrjavceva Rafija (Jekaterinburg), Privalova Oljga (Kostroma)

REU-KOTIZOJ POR LA JARO 2004

50 rubloj (por eksterrusianoj – 5 eŭroj) – ***individua kotizo*** (la membrokarto, Jarlibro de REU, REU-bulteno kaj aliaj informoj de REU, voĉdonrajto en REU-Konferenco, rabatoj ĉe uzo de REU-servoj kaj en E-aranĝoj);

1250 rub. (por eksterrusianoj – 125 eŭroj) – ***dumviva kotizo*** (ĉio la sama dum la tuta vivo);

25 rub. – ***familia kotizo*** (la membrokarto, voĉdonrajto en REU-Konferenco, rabatoj ĉe uzo de REU-servoj kaj en E-aranĝoj);

100 rub. + 25 rub. por ĉiu aligita membro (ne malpli ol 5; krom individuaj membroj de REU) – ***kolektiva kotizo*** (po 1 ekzemplero de REGo kaj Jarlibro de REU por ĉiu komenciĝinta deko de la aligitaj membroj, aliaj informoj de REU por la kolektivo; la membrokartoj, voĉdonrajtoj en REU-Konferenco, rabatoj ĉe uzo de REU-servoj kaj en E-aranĝoj por la aligitaj membroj).

La rabatita abono de REGo por ajna individua membro de REU (inkluzive la dumvivajn kaj familiajn, sed ne por la aligitaj) en 2004 kostos 100 rublojn (por la eksterrusianoj – 12 eŭrojn). La dumvivaj membroj, kiuj pagis sian kotizon en 2001-2003 (kaj tial ilia kotizo enhavis la koston de REGo), plu ricevados REGon sen aldona pago. Aliaj dumvivaj membroj (kies kotizo ne inkludis la koston de REGo) por ricevi la gazeton devos pagi ĉiujare la rabatitan abonkoston.

La rublaj kotizoj sendendas al: Чертилову Михаилу Константиновичу, а/я 21, Одинцово-6, 143006 Московская обл.; la eŭraj kotizoj pagendas al la konto reua-p ĉe UEA.

Eksciu, ke...

NOVAJ REJM-MEMBROJ POR 2004

Andrejsons Sergej, Fedotova Aleksandra, Jakovleva Irina, Kadar Aleks, Konstantinov Anton, Muljukova Antonina, Rogaĉova Anna, Saljkova Galina, Ŝevĉenko Olĵga, Tiĥonov Jevgenij, Tiĥonov Sergej, Truĥin Aleksandr, Vasiljeva Alina

Patronoj: *Gonĉarova Irina, Mironova Irina*

Korekto. En la antaŭa numero de REGo en la listo de REJM-membroj por 2004 anstataŭ Aleksej Kozlov erare estis indikita Aleksej Kuznecov.

E-KONFERENCO EN KALININGRADO

La 24-an de februaro 2004 en la Marista Kulturpalaco okazis Konferenco de Kaliningrada Regiona E-Unuiĝo "La Ondo de Esperanto". La Konferenco daŭris du horojn. La konferenca diskutado estis multe pli vigla kaj pozitiva ol en la du antaŭaj Konferencoj.

La Konferenco akceptis la agadraporton kaj la financan raporton de la Komitato de KREU kaj la raporton de la Kontrol-Revizia Komisiono de KREU.

La Konferenco elektis la novan Komitaton de KREU (Halina Gorecka, prezidanto; Nikolaj Penĉukov, sekretario; Oleg Daniljuk, membro) kaj la Kontrol-Revizian Komisionon (Leonid Romenskij, prezidanto; Galina Penĉukova kaj Larisa Babajeva, membroj).

La Konferenco aprobis buĝeton de KREU por 2004 kaj akceptis kotizregularon por 2004: 300 rubloj – baza kotizo; 150 rubloj – kotizo por familianoj kaj nelaborantoj.

Inter aliaj decidoj kaj dezir-esprimoj de la Konferenco estas jenaj:

– okazigi la 15-an de majo 2004 Tagon de Esperanto por partneroj, ĵurnalistoj kaj aliaj interesitaj personoj;
– okazigi Ago-Tagon en oktobro 2004 kunlabore kun "Varsovia Vento";
– okazigi en decembro 2004 Zamenhofan Semajnfinon kunlabore kun la Ĝenerala Konsulejo de Pollando;
– komisii al la Komitato de KREU esplori eblon fondi ZEO-n en Kaliningrado;
– komisii al la Komitato esplori eblon okazigi Lingvan Festivalon en 2005;
– alvoki membrojn, kiuj ne pagis sian kotizon en 2003, pagi ĝin en 2004 kiel "libervolan donacon";
– helpi funkciadon de la Esperanto-rondeto en la juda societo;
– intensigi informkampanjon en la universitato cele al starigo de kurso je la universitata nivelo;
– komisii al la Komitato fari adresaron de kaliningradaj esperantistoj.

(Esperanto-rus-informoj)

ĈEBOKSARA E-MOVADO EN FEBRUARO-MARTO

Pasis la 5-a Festivalo de interesoj en Ĉeboksari (27-28.03.04)

En la festivalo partoprenis pli ol 20 junularaj neregistaraj organizoj kaj ĉirkaŭ 300 spektantoj. Dum la unua tago por aktivuloj de junularaj organizoj estis preparitaj 5 seminarioj. La dua tago komenciĝis per oficiala malfermo, dum kiu la neregistaraj organizoj prezentis sin sur la scenejo kaj parolis pri FdI-agado (estis menciite ke en Ivanovo samtempe pasis la 6-a FdI). La ĉefo de la junulara komitato salutis aktivan junularon. Estis ankaŭ agrable ke por prezenti junularan agadon organizantoj de FdI invitis sur la scenejon oficiston de Ĉeboksara Esperanto-centro A.Fedotova. Dum la tago estis standa ekspozicio de neregistaraj organizoj kaj prezentoj de la organizoj en apartaj ĉambroj.

Aktivul-trejnaj seminarioj (ATS) pri instruado kaj subvencipetado

La 22-an de februaro okazis seminario pri instruado. Organizantoj estis Aleksandr Blinov kaj Katja Burmisova, partoprenis 15 personoj. Oni pridiskutis diversajn metodojn de instruado, metodikon de gastaj instruadaj kursoj, la ĉefajn momentojn, kiujn oni devas atenti en tiu malfacila sed entuziasmiga afero. La 10-an de aprilo devas okazi ATS "Subvencipetado: kiel verki sukcesajn projektojn". La ĉefa preleganto estos Dmitrij Fjodorov, ĉefo de Ĉuvaŝa respublika neregistara organizo "Centro de subteno de sociaj iniciatoj".

Esperanto-kursoj en Ĉeboksari

Nuntempe en Ĉeboksari estas organizitaj 4 E-kursoj por komencantoj. Unu kurso pasas surbaze de fremdlingva fakultato de la Ĉuvaŝa ŝtata pedagogia universitato (gvidas Alina Vasiljeva), du grupoj kunvenas en la medicina kaj radielektronika fakultatoj de Ĉuvaŝa ŝtata universitato (gvide de Irina Semjonova kaj Irina Stomenskaja), grupo de plenkreskuloj havas lecionojn en la Respublika infanjunulara biblioteko (gvidas Aleksandra Fedotova). Daŭras 2 kursoj por progresantoj: junularan grupon gvidas Danil Kapitonov, al plenkreskuloj instruas Aleksandra Fedotova. Por membroj de la Asocio estis organizita kurso de la itala lingvo. Gvidas Aleksandr Blinov.

Asociaj aranĝoj (Sporta tago, Arta semajnfino, Lingva olimpiko)

La 23-an de februaro la klubo "Evoluo" okaze de la tago de defendanto preparis sportan tagon. Partoprenis 14 personoj. En la olimpiko estis multe da amuzaj stafetoj ne nur por la korpo, sed ankaŭ por la kapo. La 6-an de marto okazis Arta semajnfino sub la titolo "Printempa poemo". La partoprenantoj povis labori en artaj metiejoj. Inter la kluboj "Edmond Privat", "Evoluo" kaj "Ĉielarko" estis organizita Arta konkurso, kantis Esperanto-koruso sub gvidado de Irina Romanova. Estis prezentita nova numero de "Arta Koktelo". Okazis Arta vespero de Sergej Tiĥonov. Laŭ komuna opinio tio estis la plej neordinara kaj memorinda programero de AS. Entute en AS partoprenis pli ol 45 personoj. La 25-an de marto en la klubo "Evoluo" okazis Lingva olimpiko. Dezirantoj konkuris en deklamado de parkerigita verso, traduka kapablo, retoriko (parolado pri unu el proponitaj (lotumitaj) temoj kun antaŭa 5-minuta prepariĝo).

Porsocia agado

Dum februaro-marto en lernejoj de Ĉeboksari kaj Novoĉeboksarsk estis organizitaj: du lingvaj karavanoj (la 6-an de februaro kaj la 20-an de marto); du prezentoj de Esperanto (la 17-18-an de marto); Festivalo de hungara kulturo (la 20-an de marto, kunlabore kun la Kultura centro de Hungara Respubliko en Moskvo). En amaskomunikiloj aperis artikoloj pri Asocio (la ĵurnalo "Molodeĵnij kurjer"), kvizo pri Hungario enkadre de Festivalo de Hungara kulturo ("Molodeĵnij kurjer" kaj "Junulara gazeto" en la rusa kaj la ĉuvaŝa), intervjuo pri Asocio kaj Esperanto (en Ĉuvaŝa radio en la ĉuvaŝa), artikolo pri partopreno de A.Vasiljeva en Lingva Festivalo en Uljanovsk ("Molodeĵnij kurjer").

Ni prepariĝas por la IJK-60

Al la aranĝo jam aliĝis pli ol 180 esperantistoj. Inter ili 22 estas el Ĉeboksari. Por IJK al nia asocio estis komisiite prepari kelkajn programerojn – "Rusa foiro", "Festo de Ivan Kupala", "Festivalo de kulturoj", prezento de Lingva Festivalo. Jam aperis skizoj por scenaro de "Rusa foiro" kaj por "Festivalo de kulturoj". La 3-an kaj 4-an de aprilo ĉe Ĉeboksara E-centro okazis organiza kunveno pri "Rusa foiro" kaj "Festivalo de kulturoj".

preparis Aleksandra Fedotova (Ĉeboksari)

E-KURSO EN JALTA

Kelkajn lastajn jarojn mi ne plu okupiĝis pri E-instruado, ĉar konsideris, ke pli valora estas alia E-agado. Sed ĉar ni ekkuraĝis revivigi ĉi-septembre la festivalon "Velura Sezono", ni ekbezonis freŝajn helpantojn. Tial ni decidis denove organizi E-kursojn. Antaŭe la varbado ĉiam garantiis 20-40 kursanojn. Sed ĉi-jare oni avertis min, ke la situacio ŝanĝiĝis kaj ne plu estos tiom da ili.

Ni, la klubanoj, organizis la varbadon sammaniere kiel antaŭe: 2 semajnojn antaŭ la prelego pendigis ĉ. 100 afiŝojn sur la stratoj, semajnon antaŭ la prelego aperigis artikolon pri Esperanto en ĵurnalo, 2 tagojn antaŭ la aranĝo mendis en du ĵurnaloj anoncojn kaj tagon antaŭe – trifojan informon per loka radio.

Unusola novaĵo: ĝi nomiĝis "Renkontiĝo-Koncerto", kaj ĝin partoprenis neesperantisto – konata bardo (por altiri pli da homoj). Tutegale venis ne multaj kaj preskaŭ mankis gejunuloj: en la halo duono estis esperantistoj (ĉ. 20). Registriĝis por la kursoj 12 (preskaŭ ĉiuj taŭgaj aŭskultantoj, ĉar estis ankaŭ maljunaj homoj kaj, ridinda detalo, 2 putinoj: unu el la ĵurnalaj informoj aperis en la "Interkonatiĝoj"). Ĉio ĉi montris, ke vere homoj ignoras la afiŝojn, anoncojn ktp. (des pli en granda urbo). Aliflanke tiujn, kiuj venis, la aranĝo konvinkis eklerni la lingvon.

Sekvatage ni vizitis la rektoron de Humanscienca Instituto kaj li ordonis al la dekano de la filologia fakultato organizi prelegon pri Esperanto por studentoj-filologoj. La prelegon ĉeestis ĉ. 100 studentoj, al la kurso aliĝis 10 (tio nin kontentigis) kaj samtempe mi ricevis ejon por la kurso. Konkludo: por la varbado oni prefere provu prelegi en kelkaj institutoj. Des pli, ke tio estas senpaga.

Interalie por la anoncoj kaj afiŝoj ni elspezis ne malmulte – ĉ. 30 dolarojn. Sed tiun monon ni reprenos de la kursanoj: la studentoj pagos po 3 dolaroj, la plenkre-

skuloj po 6 por la 3-monata kurso. Mizera pago, sed sufiĉa por rekompenci la elspezojn kaj fine de la kurso premii la plej bonan kursanon.

Jefim Zajdman (Ukrainio)

HUNGARIO: ESPERANTO ESTAS VIVA LINGVO!

"Post plurjara batalo hungariaj esperantistoj sukcesis rekonigi Esperantan lingvon viva, – diras Oszkár Princz, la ĝenerala sekretario de Hungaria Esperanto-Asocio. – Kompreneble por esperantistoj neniam estis dubo pri tio, ke la Esperanta lingvo laŭdevene estas artefarita, planita lingvo, sed ĝi fariĝis viva lingvo." La Ministerio pri Instruado en letero informis la Hungarian Esperanto-Asocion, ke laŭ la deklaro de Lingvoscienca Instituto de Hungara Scienca Akademio Esperanto kvalifikiĝis kiel viva lingvo. Lastatempe kelkaj ŝtataj instru-institutoj ne volis taksi Esperantan lingvon egalrajta al aliaj lingvoj. Ĉi tiu kvalifikado bremsis ĝis nun la instruadon de la internacia lingvo. De la jaro 1995 estiĝis interesa fenomeno en Hungario pro la apero de leĝo pri la deviga ekzameniĝo pri fremdaj lingvoj en altlernejoj kaj universitatoj. "Ekde tiu tempo abrupte ekkreskis la nombro de tiuj gestudentoj, kiuj trapasas ŝtatan lingvoekzamenon", klarigas Princz, kiu ankaŭ kunordigas la Esperanto-lingvoekzamenojn ene de la Fremdlingva Pluperfektiga Centro (FPC). La plimulto de gestudentoj dum la lastaj jaroj trapasas ŝtatan lingvoekzamenon pri la lingvoj angla, germana, franca. En la jaro 2002 sur la popularecolisto la trian lokon okupis Esperanto, forpuŝante de la tria loko la francan. Studentoj preferas Esperanton pro tio, ke ĝi estas facile lernebla kaj la reguloj preskaŭ senesceptaj. Lingvistoj kalkulas ke komencanto por lerni Esperanton bezonus sesonon de la tempo kompare kun aliaj lingvoj kiel la angla, franca aŭ germana. "Nun ni jam povas denove proponi Esperanton inter la elekteblajn studobjektojn de lernejoj funkciantaj sur ĉiuj niveloj." La sukceso, laŭ Princz, baziĝis ankaŭ sur la plurjardekaj esperantistaj agadoj kaj ĉefe tiu de esperantistaj lingvistoj.

(lingva-demokratio)

ESPERANTO-SIMPOZIO 2004

En tiu ĉi jaro Internacia Esperanto-Muzeo (IEM) festas jubileon. Antaŭ 75 jaroj ĝi fariĝis parto de la Aŭstria Nacia Biblioteko. Estas unika fakto, ke Nacia Biblioteko oficiale vivtenas Esperanto-muzeon kaj Esperanto-bibliotekon. Pro tiu subteno IEM fariĝis la plej granda plene funkcianta biblioteko por Esperanto kaj interlingvistiko, tute je la servo de esperantistoj kaj lingvistoj. Pere de la hejmpaĝo: <http://www.onb.ac.at/sammlungen/plansprachen/eo/index.htm> estas alirebla ĝia elektronika katalogo TROVANTO.

Okaze de du Esperanto-jubileoj: la centa datreveno de la naskiĝo de Lidia Zamenhof (1904 – 1942) kaj la 75-jariĝo de la Internacia Esperanto-Muzeo (IEM, aligita al la Aŭstria Nacia Biblioteko en 1929) Aŭstria Nacia Biblioteko organizos en kunlaboro kun Universala Esperanto-Asocio Internacian Esperanto-Simpozion "Esperanto en la Uragano de Ideologioj" la 8-an kaj 9-an de oktobro 2004. Prelegos Ulrich Lins (Germanio/Japanio, ĉefpreleganto), Vilmos Benczik (Hungario), Wera kaj Detlev Blanke (Germanio), Heiner Eichner (universitato de Vieno, Aŭstrio),

Alex Kaefer (Aŭstrio), Herbert Mayer (IEM, Aŭstrio), Claude Piron (Svisio). La historio de Esperanto kaj la sorto de esperantistoj estas firme ligita al la ĝenerala historia evoluo. Tion montris Ulrich Lins per "La danĝera lingvo. Studo pri la persekutoj kontraŭ Esperanto". Esperanto do estas ne io ekzotika kaj marĝena, kiel foje opinias la ĝenerala publiko, sed integra parto de historiaj evoluoj. Tiu fakto estas la elirpunkto de la simpozio, kiu pritraktas la destinon de Esperanto en la politikaj-ideologiaj uraganoj de la pasinta jarcento, fokusante interalie la atenton al la sorto de Lidia Zamenhof (murdita en la koncentrejo Treblinka en 1942) kaj de la Internacia Esperanto-Muzeo (fermita en 1938 fare de la nazioj). Apud tio pritraktiĝos ankaŭ temoj, kiuj tuŝas la nuntempon: Kia estas hodiaŭ la situacio de Esperanto en la mondo? Kiel aspektas la rilato inter Esperanto kaj la nunaj politikaj regantoj? Kiel kondutu la esperantistoj en la mondo, kiu almenaŭ en la publika diskurso ege malfavoras la ideon de artefarita internacia helplingvo, sed aliflanke pere de modernaj teknologioj ofertas novajn eblojn? Paralele okazos: malfermo de ekspozicio pri la sama temo en la Internacia Esperanto-Muzeo, prezento de la noveldonita plena verkaro de Lidia Zamenhof kaj internacia Cseh-kurso por tutkomencantoj. Partoprenkotizo - 50 eŭroj, por studentoj kaj lernantoj - 35 eŭroj. Aliĝo: <plansprachen@onb.ac.at>; Mag. Helga FARUKUOYE, Sammlung für Plansprachen und Esperanto-Museumder Österreichischen Nationalbibliothek Hofburg, Michaelerkuppel, AT-1010 WIEN; tel. +7-43-1-5355145.

BREST[1]-VLADIVOSTOK PER BICIKLO

Zephirin Jegard, alinome Zef, estas bretono. Li naskiĝis en 1935. De kiam li emeritiĝis, li povis dediĉi sin al sia pasio: biciklado. Imagu: en 1999 li partoprenis en la bicikla kurado Brest-Parizo-Brest, t.e. 1250 kilometroj senhalte dum 58 horoj! En 2000 per peze ŝarĝita biciklo li vojaĝis de Yffiniac, la urbo en kiu li loĝas nun, al Oriento tra Germanio, Hungario, Rumanio, Moldavio, Ukrainio kaj granda parto de Rusio: Norda Kaŭkazio, Tatario, Baŝkirio, Uralo, Siberio. Post 5 monatoj li preterpasis Bajkalon, t.e. entute 10 700 km. Poste li revenis al Bretonio.

En 2001 li rekomencis: de Islamabad (Pakistano), kien li iris aviadile, li biciklis tra Ĉinio, trairante la dezerton Taklamakan, la altebenaĵojn de Kinghai, daŭrigis laŭlonge de la Flava Riverego kaj atingis Mongolion tra la dezerto de Gobi. De tie li plue iris orienten tra infera tajgo kaj laŭ vojoj en stato pli ol malbonega. Ne eblas detale priskribi ĉion, kion li faris aŭ intencas fari, sed, resume, ni aldonu ke en 2002 li trairis Kanadon, en 2003 – Nordan Kaŭkazion, kaj ree partoprenis en la senhalta kurado Brest-Paris-Brest dum 56 horoj!

Kaj nun? La 1-an de majo 2004 li ekiros de Brest por atingi Vladivostokon dum laŭeble plej malmulte da tempo, parte laŭ la spuroj de Michel Strogoff. Tamen, ĉifoje li estos akompanata de interpretisto. Ĉio peza estos en veturilo, kiu sekvos lin. Malgraŭ tio, la vojo estos longega kaj ne facila: 14 000 km, 9 horzonoj. Skizo pri lia itinero (antaŭ ol atingi Ivanovo-n, li evitos la grandajn urbojn, N signifas "norde

[1] Temas pri la plej okcidenta mezgranda urbo en Francio, sed ne pri la samnoma en Belorusio. (Red.)

de”, S – “sude de”): N Parizo, S Bruselo, N Hanovro, S Gdansk, S Kaunas, N Moskvo, Ivanovo, Niĵnij Novgorod, Ĉeboksari, Kazanj, Permj, Jekaterinburg, Tjumenj, Omsk, Novosibirsk, Kemerovo, Krasnojarsk, Irkutsk, Ulan-Ude, Ĉita, Ĥabarovsk, Ussurijsk, Vladivostok. Li kalkulis, ke se li biciklos proksimume 200 km ĉiutage, li atingos Vladivostokon post 60-75 tagoj. Certe valoros atentigi dumvoje la amasinformilojn pri tiu eksterordinara sporta faro. Sed li certe ne povos halti ie ajn kaj longdaŭre. Se vi vidos lin dumvoje, ne bremsu, ne ĝenu lian iradon, ne haltigu lin, des pli ke li firme intencas doni al Esperanto la lokon, kiun ĝi meritas! Tamen, flagrubandoj, Esperanto-flagoj, huraoj kaj vivuoj certe ne ĝenos lin!

Ni esperu ke nia amiko iam eniros la Libron Guinness de la Rekordoj... Kial ne? Kuraĝigojn kaj subtenojn oni povas sendi al li: Zef Jegard, <jzefj@wanadoo.fr>. Pli detala priskribo de liaj atingoj kaj projektoj aperos ĉe <www.zefj.com>.

Henri Masson (Francio)

SOMERE VENU AL “SOMERE”

la 26-a de julio – la 8-a de aŭgusto 2004, sudokcidente de Bonn

Karaj ŝatantoj de agrablaj renkontiĝoj! Kien iri somere?

Ni proponas: SOMERE, la 2-a Somera Mezeŭropa Renkontiĝo

Ĉi-jare en la mezmontara regiono Eifel, 40 kilometrojn sudokcidente de Bonn. Ni trovis domon kun ĉarma ĝardeno en Kall-Krekel, sudoriente de Akeno (inter Schleiden kaj Blankenheim). La domo situas en bela ĉirkaŭaĵo kaj relative proksimas al la landoj, el kiuj venis plimulto de la pasintjaraj eksterlandaj partoprenantoj: Nederlando, Belgio, Francio kaj Luksemburgio estas apudaj, kaj ni sekve esperas, ke denove estos bela internacia renkontiĝo kun infanoj. La retaj informoj kun bildoj kaj aliĝilo troviĝas ĉe <http://www.EsperantoLand.org/somere>.

La programa skemo estos simila al la pasintjara: ni havos lingvokurson en la komencaj kvin tagoj, estos prelegoj, ni faros promenojn kaj ekskursojn, ni ludos kaj babilos. Ni provos aranĝi ankaŭ iom da kultura programo kaj jam havas anoncon pri danca ateliero. Ĉu eble vi havas ideon, kiu muzikisto aŭ alia kulturulo ŝatos ferii en SOMERE? Dankon pro via helpo!

Tranoktado estos en ĉambroj aŭ tendoj. Ankaŭ la aranĝo pri tranoktado kaj manĝoj estos simila al tiu de la pasinta SOMERE: vi povos elekti, ĉu loĝi en la domo aŭ en tendo, ĉu manĝi grupe aŭ mem zorgi pri viaj manĝoj. Kompreneble via familio ankaŭ povos dividiĝi – eble viaj infanoj entuziasmos pri tendo kaj vi malpli... La aĝogamo estos same vasta kiel pasintjare: de infanoj kaj dudekkelkjaruloj gis sepdekjaruloj.

Ankaŭ ĉi-jare ni ofertos intensan kurson en la unuaj tagoj por ebligi la partoprenon al komencantoj kaj progresantoj. Ĉi-foje ĝi okazos de lundo, 26-a de julio, gis vendredo, la 30-a. Tiel eblos kiel pasintjare en unu sama aranĝo rapide eklerni kaj tuj poste praktiki la lingvon en internacia medio.

Estas rabatoj por eksterlandanoj kaj programkontribuantoj (kaj por la donacantoj kaj kunlaborantoj de EsperantoLand).

Venu SOMERumi kun ni!

(esper-inform)

NESTO APUD NIĴNIJ NOVGOROD

Saluton! Esperanta klubo de Niĵnij Novgorod aludas al ĉiuj amatoroj de varmo kaj suno ke somero baldaŭ venos kaj...

Aludo № 1. Anoj de Esperanto-klubo de Niĵnij Novgorod tre ŝatas organizi somerajn tendarojn.

Aludo № 2. Julio estas la plej bona monato dum rusia somero: vetero bonegas, aero kaj riveroj tre varmas, naturo belas kaj vokas nin kuniĝi kun si.

Aludo № 3. Se vi vizitos IJK-on, ni pensas ke vi ne volos tuj reveni hejmen.

Aludo № 4. IJK-ejo tre proksimas al Niĵnij Novgorod.

Aludo № 5. Ni konsilas al vi ne plani ion ajn por la periodo de la 17-a ĝis la 25-a de julio.

Aludo № 6. Manĝaĵo kuirita surlignofajre ege bongustas.

Aludo № 7. Ĉiuj en la mondo jam delonge komprenis ke drinki kaj fumi ne estas bone por la sano.

Aludo № 8. Somere plej oportunas kontakti sunon, aeron kaj akvon senveste, kaj dormo en tendo tre dolĉas kaj sanigas.

Aludo № 9. Ni tre ŝatas donaci kaj havas bonegan sponsoron – INOE (Internacia Naturista Organizo Esperantista).

Aludo № 10. Senpaga fromaĝo aperas nur en muskaptilo. La tendaro estos ne senpaga, kaj tamen ne tro altpreza.

Pli da informo vidu ĉe <http://nesto2004.chat.ru>.

KONFERENCO DE LATVIA ESPERANTO-ASOCIO

La 6-an de marto 2004 okazis la 7-a Konferenco de Latvia Esperanto Asocio. La Konferenco estis dediĉita al la 15-jara jubileo de la Asocio, al la 115-jara jubileo de la unua Esperanto-lernolibro por latvoj kaj al la 150-jara naskiĝdatreveno de ĝia aŭtoro Rudolfs Libeks. La konferenco okazis en unu el belegaj haloj de la domo de Latva Societo en Rigo. Registriĝis 37 partoprenantoj. Plejparte riganoj, sed ĉeestis ankaŭ reprezentantoj de aliaj regionoj, kiuj dum la Konferenco raportis pri agado de siaj kluboj. El famaj ekster Latvio personoj ĉeestis Nikolao Grišin el Ventspils (konata ankaŭ kiel Konkordo).

Salutvortojn diris la prezidantino de la Asocio s-ino Alida Zigmunde. Pri la vivo kaj agado de R.Libeks kaj pri la unua lernolibro prelegis Margarita Zelve. Pri la temo "Latvia Esperanto Asocio – 15" prelegis Alida Zigmunde. Okaze de la 15-jara jubileo de la informbulteno de la asocio, ĉefredaktorino de "Latvia Esperantisto" Margarita Zelve faris nelongan prelegeton ""Latvia Esperantisto" retrorigarde". Okazis ankaŭ reelektoj de la estraro de LatEA. Poste estis elektita ankaŭ prezidanto de la Asocio. La antaŭa prezidantino Alida Zigmunde ne plu volis resti en la estraro. Nova prezidanto de LatEA estas Aldis Bušs, vicprezidantino – Biruta Rozenfelde, pri financaj aferoj kaj informado respondecas Margarita Želve, en estraro estas ankaŭ Mara Timermane (turismo), Aina Januševska, Genovefa Tamane kaj Aivars Kalninš.

(landa-agado)

LA PLEJ BONA RADIELSENDO PRI ESPERANTO-MUZIKO

Valerij Beluncov, komponisto kaj prikomputila ĵurnalisto, eksperto pri muzik-komputilaj teknologioj, estas bone konata al fakuloj. Lia ĉiusemajna 20-minuta programo "Virtualnij meloman" aperas en la ĉefa kanalo de Rusia radio ĵaŭde post la 22-a horo. Ĝi rakontas pri populara muziko en Interreto. La 12-an de februaro ĝi estis plene dediĉita al kantoj en Esperanto. La aŭtoro-gvidanto menciis bazajn faktojn pri Esperanto; diris ke nun ĝi evoluas same kiel ĉiuj lingvoj, ke ĝia riĉa kulturo konsistas ne nur el tradukoj, sed ankaŭ el diversaj originalaĵoj.

En la elsendo sonis, plene aŭ fragmente, 7 kantoj, kiel ekzemplo de diversaj ĝenroj. Estis dirite, ke "La Espero" estas la plej populara inter korusaj E-kantoj. Oni povis aŭdi la grupojn "Kore", "Dolcxamar" kaj "Kaj tiel plu", du francajn solistojn. Sonis ankaŭ "Mia kara amik'" de Vladimir Soroka (supozeble el la malnova vinildisko "Destin'") kaj "Valso por amikoj" de Ĵomart kaj Nataŝa, kiuj estis nomitaj "la plej kortuŝa ensemblo en Esperanto".

Senteblis tre bona rilato de V.Beluncov al E-o, li tute korekte prononcis kaj tradukis ĉiujn E-vortojn. Estis nenio el kutimaj eraroj kaj superstiĉoj. Mi tute sincere povas diri, ke "Virtualnij meloman" la 12-an de februaro estis la plej bona radielsendo pri Esperanto-kulturo, kiun mi iam aŭdis. Verŝajne eĉ neniu el e-istoj povus fari pli bonan.

Se vi havas bonan Interreton, vi povas reaŭskulti tiun elsendon: venu al <http://www.radiorus.ru/issue.html?iid=17559&rid=> kaj poste premu la piktogramon sub la elsendo-titolo.

Plej mirinde estas, ke neniu el konataj esperantistoj helpis al Valerij. En lia anglalingva retpaĝo <http://musica.da.ru/> estas menciite, ke inter kelkaj lingvoj li parolas ankaŭ Esperanton. Kelkaj moskvaj esperantistoj jam establis kontakton kun li; li menciis, ke bedaŭrinde mankas tempo por serioze okupiĝi pri nia lingvo kaj viziti kongresojn – tamen li ekinteresiĝis pri la diskoj "Oraj Kantoj" kaj pri ebla veno de Ĵomart kaj Nataŝa.

Valentin Melnikov (Moskvo)

EVA HAVAS NOVAN KOMITATON

Esperantlingva Verkista Asocio (EVA; fondita en 1983) havas novan komitaton. Kiel prezidanto estis elektita Mauro Nervi, vicprezidanto – Tomasz Chmielik, sekretario – Spomenka Štimec, kasisto – Tomasz Chmielik. En la komitato krome membras Anna Löwenstein, Trevor Steele, Paul Gubbins kaj Mao Zifu. La nova paĝo de EVA estas <www.everk.org>. Ĝia prizorganto estas Mauro Nervi. Kiel

dum la pasintaj jaroj ankaŭ ĉi-jare EVA kandidatigis William Auld por Nobelpremio pri literaturo.

Spomenka Štimec (Kroatio)

NOVAĴOJ EL UKRAINIO

En Ukrainio la Societo por subteno kaj defendo de ukraina kulturo "Espero" (la gvidanto – M.Lineckij) produktis KD "Ukrainaj kantoj en Esperanto". En ĝi estas kolekto, konsistanta el 20 popolaj diversĝenraj kantoj, kiuj sonas 48 minutojn. Kantas la 4-persona ensemblo "Ukraina kanto": N.Ivanova, M.Lineckij, O.Mirgorodskaja, M.Ŝabala. Partoprenintoj en RET-02 aŭdis parton de la kantoj. La KD estas akompanata per tekstolibreto, en kiu ĉiuj kanto estas prezentita 3-maniere: en Esperanto, en la normala ukraina kaj en la ukraina, sed per Esperanta ortografio. Do se iu volas mirigi la amikojn per siaj lingvokapabloj, tiu povas ellerni ukrainajn kantojn en la ukraina. Po unu strofo de ĉiu kanto el la disko eblas aŭskulti en la ttt-ejo <www.espero.kiev.ua>. Se vi estas interesita havi ĉi tiun KD, informu min (la adreson vidu sube) aŭ mendu en la Libroservo de REU. Por ŝatantoj aŭskulti kasedojn tre baldaŭ estos produktitaj ankaŭ ili.

tiel aspektas la kovrilo de la disko

Jam aperis la dua numero de ukrainlingva gazeto "Esperanto por infanoj" (la redaktoro – M.Lineckij). Estas peto al ĉiuj legantoj de REGo sendi al mia adreso iujn amuzajn historiojn ligitajn kun Esperanto: necesas ja allogi junan generacion.

Organiza Komitato de "Festivalo de kulturoj REJo-3" memorigas, ke ĝis la 02.07.2004 restis ne tiom multe da tempo. Ni ege petas ĉiujn, en kies kapoj maturiĝas la ideo veni al REJo-3, almenaŭ informi nin pri la intenco rete <rejo@uafree.net> aŭ poŝte – Mikaelo Lineckij, p/k 91, Kijiv-201, UA-04201, Ukrainio. La rusiaj partoprenontoj estu pretaj prezenti iujn rusajn kulturaĵojn – eĉ ion specifan el la kuirarto. Mi memorigas la koston por rusianoj (eŭroj/rubloj): ĝis 16 jaroj – 35/1300; ĝis 25 jaroj – 40/1450; post 25 jaroj – 45/1550. La kotizo inkluzivas: aliĝkotizon, 3-fojan manĝon, loĝon kaj la programon.

Mikaelo Lineckij (Ukrainio)

DU NOVAJ VERSAĴOJ DE KLARA ILUTOVIĈ

MI NE SCIIS…

Filmoj, libroj, ekskursoj
La oferojn ignoras.
Klamo, rido, ĝojzumo
Feste regas dum cirka solen'.
Mi ne sciis, ke ursoj
Nur kvin jarojn laboras,
Blindigate de lumo
Super fremda vastej' de aren'.

La natur' je la bildoj
Admirigas konstante.
Rimarkinde sagacaj
Estas ĉiu herbero kaj roj'.
Mi ne sciis, ke birdoj,
Al la sudo flugante,
Ĉe flugiloj la lacaj
Kalopugnojn suferas dum voj'.

Ŝanĝoj, fortoj, koloroj
Havas gravajn sekretojn.
Sur pasej' labirinta
Venas neatendita konjekt'.
Mi ne sciis, ke floroj
Turnas siajn kapetojn
For de iu taŭzinta
Ilin en sia kruda neglekt'.

Iuj scias feliĉe
Plezurigi kaj ravi,
Estingante ĉagrenon
Per la tuj revigliga influ'.
Tamen kiu sufiĉe
Multe scias por havi
Pli profundan komprenon
De la viv' por ne rompi ĝin plu?..

SE EBLUS REKOMENCI LA VIVON…

Se mi povus rekomenci la vivon,
Multon alimaniere mi farus.
Mi vigligus la rutinan jardrivon,
Kaj la vojon timsugestoj ne barus.

Ne bruligus min ofendoj detrue,
Vivmielon mi neniam rifuzus,
Esperanton mi eklernus pli frue
Kaj sendube pli fervore ĝin uzus.

Ne atentus mi maljustan kulpigon,
Evitante la vivguston veneni,
Kaj ne fidus riskoplenan instigon
Porti pli ol mi kapablas elteni.

Kaj ne pezus la anim' kvazaŭ ŝtona
En rimorsoj, kiuj blovas neĝvente.
Ja la vivo povus esti pli bona,
Se mi scius vivi ĝin pli prudente!

Mi rigardus kun aŭdac' l' efektivon,
Kaj tra pluvoj min salutus la sun'.
Se mi povus rekomenci la vivon –
Ĉio estus, kiel ĝis nun…

En la versaĵo "Memore al E.A.Bokarev", publikigita en la antaŭa numero de REGo (en la dua kovrilpaĝo), estas du eraroj. Fine de la dua linio en la unua strofo devas esti punkto, sed ne komo. En la tria linio de la dua strofo la lasta vorto devas esti "volforto", sed ne "rokforto". ***(La red.)***

LA 1-A DE APRILO

aŭ "la tago de ŝtipkapulo", aŭ "la tago de kukolo"

Naskiĝo de la unuaaprilaj kutimoj

Neniu scias precize, de kie aperis la kutimo ŝerce trompi amikojn kaj konatojn. Ekzistas nur supozo, ke ĝi venis de romianoj, ĉe kiuj ĝi estis parto de la solena pagana festo, dediĉita al la dio de rido, kaj estis aranĝata la 17-an de februaro. Honore al la festo oni faris ludojn, akompanatajn de gajaj ritoj. Romianoj diris: "Ni la nuraj en la tuta mondo honoras la grandan dion, nomatan rido…" Por agrabligi la dion estis rekomendate forĵeti el la kapo ĉagrenojn kaj malĝojojn kaj elpensi ion spritan kaj amuzan.

En Francio alvenon de nova jaro oni pli frue festis la 1-an de aprilo, sed en 1562 la papo Gregorio la 13-a estigis por la tuta kristana mondo la novan, la gregorian, kalendaron, laŭ kiu la Novjaro estis transigita al la 1-a de januaro. Tamen iuj aŭ ne sciis pri la novaranĝo, aŭ ne volis ŝanĝi la kutimojn, daŭrigante renkonti la Novjaron la 1-an de aprilo. Tiujn homojn ili komencis priŝerceti, nomante ilin "aprilaj stultuloj".

Ekzistas ankaŭ alia versio de apero de tiu ĉi festo kaj ĝia nomo. En aprilo en Francio komenciĝas kaptado de skombro – fiŝo ege populara ĉe francoj. Fiŝon, kaptitan en la unua kaptotago, la malnovtempa kutimo devigas donaci. Tamen iam fiŝistoj ne havis bonŝancon, kaj iliaj esperoj pri la donaco ne estis realigitaj. Tiel devenas la franclingva esprimo "poisson d' avril", kiu laŭlitere tradukeblas kiel "aprila fiŝo", kaj laŭsence – kiel "trompitaj esperoj".

Dumtempe la unuaaprila festo iĝis aranĝata en Anglio kaj Skotio, poste – en ĉiuj landoj.

Nun la festo de ŝercoj havas diversajn nomojn: en Usono kaj iuj aliaj landoj la

1-a de aprilo nomiĝas “la tago de stultuloj”, en Skotio – “la tago de kukolo”, en Hispanio – “la tago de ŝtipkapuloj”, en Japanio – “la tago de pupo”.

La tago de stultuloj estas festo por festo, ĉi-tage oni ne faras donacojn, ne vizitas restoracion. Ĉefe estu atentema por ne iĝi stultulo aŭ, kiel diras francoj, la kreintoj de la festo, “por ne resti fiŝo”.

Mark Twain iam diris: “La unua de aprilo estas la tago, kiam ni rememoras, kio ni estas la ceterajn 364 jartagojn”. Tiun ĉi internacian feston de rido kaj ŝercoj diversaj popoloj festas kun sia karakteriza humursento. Ekzemple, en Skotio la duan festotagon, kiu nomiĝas “Taili Dey” (“La tago de postaĵo”), ĉiuj ŝercoj estas ligitaj kun la malantaŭa korpoparto. Ekzemple, eblas pendigi sur la dorson de nenion suspektanta homo la surskribon “piedpuŝu min”. En Francio la 1-an de aprilo renkonteblas homoj kun papera fiŝo surdorse; ili trankvile iras kaj ne konjektas, ke klopode de siaj amikoj aŭ parencoj ili iĝis “aprila fiŝo”. Ĉe usonanoj la plej vaste uzata ŝerco estas montri al piedoj de amiko kaj diri: “Viaj laĉoj malligiĝis”. Al unuaaprilaj ŝercoj aliĝas ankaŭ la televido. Ekzemple, en Anglio estis foje montrita mallongdaŭra filmo pri farmistoj, kreskigantaj spagetojn, kie estis detale priskribata rikoltado de sur makaroniaj arboj. Multaj kredis.

Sorto de unuaaprilaj ŝercoj

La 1-an de aprilo svisa ĵurnalo “Neue Züricher Zeitung” komunikis, ke sur la monto Jungfrau estos konstruita fervojo. Al la redakcio ektorentis informpetoj. Post kelkaj tagoj la redaktoro estis devigita atentigi legantojn pri la dato de la ĵurnalapero – la 1-an de aprilo. “Konstruado de vojo sur 3500-metran monton absolute ne eblas, – klopodis li konvinki legantojn. – Tio estas ŝerco”. Sed post kelkaj jardekoj tio iĝis jam ne ŝerco: la vojo estis farita ĝis la montosupro. Estas plej interese, ke la industriisto Gujer-Celler, entrepreninta la vojkonstruadon, unuafoje enpensiĝis pri la ideo, leginte en la ĵurnalo la unuaaprilan ŝercon.

Nordano aĉetis puzlon kaj kaŝis sin en la iglo. Post semajno li eliras kun triumfa krio:
– Mi kunmetis! Dum semajno!
– Kaj kio do?
– Ja mi kunmetis dum unu semajno, sed sur la kovrilo estas indiko: de 2 ĝis 4 jaroj!

En 1862 unu el anglaj humuraj gazetoj publikigis ŝercan unuaaprilan prognozon de tio, kiel vivos la homaro post 100 jaroj. La aŭtoro strebis laŭpove ridigi la respektindan publikon ĝuste per absurdeco de siaj aŭguroj. Kiel tiamaj legantoj reagis al liaj elpensaĵoj, oni ne scias. Kaj homoj de la hodiaŭa generacio pritaksu ilian kredindecon. Jen citaĵoj el la kurioza prognozo:

– en 1962 homoj flugos al la luno;
– ŝarĝoj kaj poŝto el Eŭropo al Azio estos liverataj laŭ aero;
– en Rusio, en Siberio, estos kreskigata kotono pene de liberaj laborantoj;
– homoj admiros la moviĝantan foton;
– virinoj povos ŝanĝi la vizaĝtrajtojn en belecsalonoj kaj porti pantalonojn;
– la homaro faros teruran malkovron… kiu minacos la vivon sur la planedo.

el la gazeto “Ja ĥoĉu vsjo znatj” (“Mi volas ĉion scii”)
tradukis Klara Ilutoviĉ (Elektrostalj)

METANAGRAMO

Por solvi metanagramon oni devas al ĉiu antaŭa vorto aldoni unu literon kaj poste anagramigi ĝin. Ekz., or' – rok' – kron' ktp. Kompreneble, ni uzas nur radikojn, sen gramatikaj finaĵoj.

Komenca litero "R": denove, malantaŭen - nia propra astro - blanka skribilo - gebova produkto - iomete elradikigi lolojn

Solvoj de la taskoj en REGo № 1 (20)

METANAGRAMOJ: *1. on – not – nokt – konat – narkot – karoten; 2. ol – kol – klon – kolon.*

DIALOGO EN KOSMO: *Saluton!; Kumeŭaŭa, la filo de la ĝangalo; Mondcivitanoj; Plejo; Tragedio en la universo; Dis!; La verda raketo; Ĉu vi konas la Teron?; La infana raso; La tragedio de l' homo; Vere aŭ fantazie; Survoje al universala civilizacio.*

KOKTELO

nova speco de intelektaj ludoj

Evidentiĝas, ke la rusa kaj Esperanto tute interplektiĝis inter si, kaj parton de rusaj vortoj konsistigas E-aj vortoj, ekz. ***тото-грамма.*** *Do, sube vi trovos rusajn vortojn, kaj la kvanto de punktoj montras, kiom da literoj troviĝas en la ellasita parto, koincidanta kun E-vorto. La E-vortoj eniras kun finaĵoj. Por plifaciligi la respondon, post la rusaj vortoj enkrampe estas klarigata signifo de la E-vorto.*

1) С. . . . сть	(homa ĉeforgano)
2) . . . . кол	(parto de homa korpo, kiun oni ofte komparas kun la edzino)
3) . . . . ва	(ĝi batas maltrankvile)
4) . . . . р	(la bazo por oreloj)
5) Бр. . .	(prapatro)
6) . . . . . к	(malkuŝi)
7) . . . . га	("lampo" kreskanta sur arbo)
8) . . . . да	(dono de la mono)
9) . . . . рта	(fiŝkaptilego)
10) . . . . к	(viziti)

La solvojn necesas sendi dum 2 semajnoj post ricevo de la gazeto al Tatjana Auderskaja poŝte (Ukrainio, 65026 Odessa-26, p/k 71) aŭ rete (<zoo@te.net.ua>, <verda99@mail.ru>).

UTILAJ ADRESOJ

REU: p/k 57, 105318 Moskvo; retadreso <esperanto@au.ru>; ttt-ejo <http://www.reu.ru/>

Libroservo de REU: p/k 4716, 432063 Uljanovsk; retadreso <yuka@vens.ru>; plena katalogo <http://reu.da.ru/rus/katalogo.htm>.

REJM: str. Dugina 17 – 62, 140180 Ĵukovskij, Moskva reg.; retadreso <rejm@euro.ru>; ttt-ejo <www.tejo.org/rejm>.

UEA: Nieuwe Binnenweg 176, NL-3015 BJ Rotterdam, Nederlando; retadreso <uea@uea.org>; ttt-ejo <http://www.uea.org>.

Memoraĵo de REK-EoLA: VOLGOGRADAJ ESPERANTISTINOJ

REGo (Rusia Esperanto-Gazeto) ***№ 2 (21) aprilo 2004***

komuna eldono de REU kaj REJM

redaktas Garik Kokolija *kunredaktas* Viktor Aroloviĉ
poŝta adreso Pjatnickoje ŝosse 45 – 105, 125310 Moskvo, Rusio
retadreso <gazeto@mail.ru>

abontarifoj por 2004:

por loĝantoj de Rusio kaj aliaj landoj de KSŜ – 140 rubloj sendendaj al:
Георгий Владимирович Коколия, Пятницкое шоссе 45 – 105, 125310 Москва
por loĝantoj de aliaj landoj – 15 eŭroj pagendaj al la konto **kklg-r** *ĉe UEA*